


1983 marto
76a jaro
n-ro 927 (3)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Ĉinoj faris
gravan
decidon
pri la lerneja
instruado
de Esperanto**



Vi trovos,

ke io ne estas en ordo inter la monatoj kaj niaj revunumeroj. La unuaj forpasas pli rapide, ol alvenas la duaj. Ni batalas ĉi tie kun amaseto da problemoj. Bonvolu ne memori nin, ke via marta numero atingis vin nur fine de aprilo aŭ komence de majo. Ni konscias pri tio multe pli profunde (kaj dolore) ol vi kapablas imagi. Cetere — por gaji en ĉagreno —, vi nun spertas tion, kio dum jardekoj estis la sorto de niaj ekstereŭropaj abonantoj. Ni faros ĉion eblan, ke tiu pena sperto daŭru kiel eble plej mal-longe. Dankon pro la pacienco ktp.

Enhavo

- 41 Instruado: Esperanto en ĉinaj altlernejoj (S. Milojević)
- 43 Akademio: Kvin novaj akademianoj
Lingvo: Makedono aŭ/kaj macedono? (Bernard Golden)
- 44 Esperanto 30 jarojn en Radio Zagreb (Emilija Lapenna)
- 45 Louis Beaucaire 1925-1983
Libromerkato: Kio pleje vendiĝis
- 46 Esperantologio: Ni bezonas dialektologion de Esperanto (Alain Dawson)
- 49 Kalendaro: Renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj, kunvenoj, kursoj...
- 52 Recenzoj: "Esperanto in the modern world / Esperanto en la moderna mondo" de R. kaj V.S. Eichholz (Martin Haase); "Tondaĵoj" de W.F. Pilger (L.H. Knoedt); "Internacia kemio-vortaro" de Manfred Westermayer (W.J. Nijveld); "Bibliografio de vortaroj" de Edward Ockey (W.A. Verloren van Themaat); "Margene de la lernolibro" de Bernard Golden (P. Daŝgupto); "Metodiko en la praktiko" de Zs. Barcsay (R. Ŝulco)
- 54 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en/pri la Internacia Lingvo)
- 56 TEJO-paĝo: Refondiĝo en Svislando; Debrecen — la urbo de la 39a IJK
- 57 Nekrologoj
Loke — fake (mallongaj novaĵoj)
- 58 Anoncetoj
- 59 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
- 60 Esperanto en radio

La kovrilo

Ni prunteprenis la du kovrilajn fotojn el pasintjara numero de *El popola Ĉinio*. Tie oni prinotis la finon de speciala Esperanto-kurso por 19 universitataj instruistoj. Post tuta akademia jaro da studado de Esperanto, tiuj geinstruistoj disiris tra la vastoj de la lando, por instrui la Internacian Lingvon. Intertempe, en Pekino komenciĝis nova kurso por pliaj universitataj instruistoj. Kiel vi vidos en la ĉi-foja ĉefartikolo, post tiuj du kursoj, la ĉinaj edukaj aŭtoritatoj nun ankaŭ leĝigis la instruadon de Esperanto en la ĉinaj altlernejoj. Tiu sinsekvo de la lerneja agado en Ĉinio — unue eduki kompetentajn instruistojn, poste leĝigi la instruadon — faras el la informo, kiu nun venas el Pekino, unu el la plej gravaj antaŭenpaŝoj en la lastatempaj evoluoj rilate la Internacian Lingvon.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; ☎ (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; ☎ (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; ☎ (215) 387 8288.

Esperanto en ĉinaj altlernejoj

La instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj estas eble la ĉefa celo de la Esperanto-movado. La realigo de tiu celo signifus decidan paŝon en la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj sekve ankaŭ en la ĝeneraligo de ĝia uzado. Kiel nun statas la aferoj, tiu ĉefa celo povus preferi nomiĝi la ĉefa revo, ĉar la Movado ne faras multe pli ol revii, ke parlamentoj kaj ministerioj subite ial ekfavoros Esperanton kaj decidus enkonduki ĝin en la lernejojn. Oni venas al tia konkludo ankaŭ post trastudo de tre utila dokumento sub la titolo "Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo", kompilita pasintjare de Germain Pirlot el Belgio.

El la dokumento de Pirlot oni konstatas, ke la Internacia Lingvo estas aŭ povas esti instruata en di-

en la lernejoj fariĝas nur unu plia ornamaĵo de la Esperanto-movado en la koncerna lando.

Ĉina Esperanto-Ligo montriĝas esti unu el tiuj landaj asocioj, kiuj sur ĉi tiu agadkampo klare distingas la revojn disde la celoj. El Pekino antaŭ nelonge venis jena informo:

"La 16an de decembro 1982, la Eduka Ministerio de Ĉina Popola Respubliko sciigis la edukajn departementojn de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando kaj altlernejojn sub sia gvido, ke Esperanto povas esti instruata kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj. La sciigo diras, ke pro kontentigi la bezonojn de la disvolviĝanta Esperanto-laboro, en- kaj ekster-landa, kaj elkulturi nombron da Esperantaj laborantoj, la Ministerio denove validigas la 'Sciigon pri la instruado de Esperanto kiel lernobjekto', faritan la 13an de aŭgusto 1963. Tio signifas, ke ĉiuj altlernejoj povas preni Esperanton kiel nedevigan lernobjekton, kaj ekde nun Esperanto povos funkcii kiel unu el la oficialaj ekzamenaj objektoj, por diplomi studentojn, promocii funkciulojn kaj varbi esplorstudentojn."

La pekina komunikado finiĝas per la aserto, ke ĉio ĉi "favoros kulturadon de Esperantaj laborantoj kaj plian disvastigon de Esperanto en Ĉinio". Jes, dankon! Estas eĉ pli ol nur tiel, ĉar la informo el Pekino influos la disvastigon de Esperanto ne nur

en Ĉinio sed ankaŭ en la mondo. Por ke tio vere okazu, ni devus lerni almenaŭ iom da strategio de la ĉinaj kaj de Ĉina Esperanto-Ligo. Jen kialoj:

La revalidigo de la permeso instrui Esperanton en ĉinaj altlernejoj okazas nun, kaj ne antaŭ unu jaro. Tio estas neniel hazarda, sed intenca kaj bone planita. Nome, de oktobro 1981 ĝis julio 1982 en Pekino okazis speciala kurso de Esperanto por 19 lingvoinstruistoj el 18 ĉinaj universitatoj kaj aliaj altlernejaj institucioj. Nur kiam tiuj 19 diplomitoj reiris al siaj instruistaj valoroj revalidigi la malnovan permeson pri



Pasintjare en Pekino: G. Sutton (dekstre) kun anoj de la instruista E-kurso

versgradaj lernejoj de dudeko da landoj. Plej ofte tamen temas pri oficialaj permesoj instrui la lingvon neoficiale, kiel nedevigan, eksterprograman aktivecon de la lernantoj, preskaŭ ĉiam kun la kondiĉo, ke troviĝu kompetenta instruisto. Ĝuste tio lasta — pri kompetenta instruisto — montriĝas la ĉefa stumblo-kialo, ĉar el la menciita dudeko da landoj nur manpleno (Bulgario, Francio, Hungario, la tri baltaj respublikoj de Soveta Unio) havas sisteman altlernejan edukadon de la instruistoj en Esperanto. Kie mankas kvalifikitaj instruistoj, tie la oficialaj permesoj instrui

la instruado de Esperanto. Tion bone sciis Ĉina Esperanto-Ligo, kiu organizis la instruistan kurson, kunlabore kun la Fremdlingva Instituto en Pekino. Oni do unue kreis, kapabligis dudekon da instruistoj, kaj nur poste revalidigis la permeson instrui. Tiel la kutima kondiĉo en la similaj permesoj en aliaj landoj — tiu kiu tekstas "se troviĝos kompetenta instruisto" — en Ĉinio anticipe forfalis. Intertempe, en septembro 1982 en Pekino komenciĝis nova instruista kurso por la senditoj de 16 aliaj ĉinaj universitataj institucioj. Tiu kurso finiĝos en julio ĉi-jare kaj do liveros al la ĉinaj altlernejoj 16 novajn instruantojn de Esperanto. Supozeble, tie ne finiĝos la lerneja agado de ĈEL. Verŝajne sekvos pliaj instruisto-kursoj aŭ eble eĉ fondo de konstanta edukejo por la estontaj instruantoj de la Internacia Lingvo.

Tiel oni bedaŭrinde ne agas en aliaj landoj. Oni ne sekvas tiun ĉinan ordon de la prioritatoj en la agado sur la lerneja kampo. Escepto, kompreneble, estas Hungario, en kiu la lerneja instruado de Esperanto verŝajne havas la plej firmajn poziciojn, ĉar oni tie ne nur oficialigis la instruadon de la Internacia Lingvo sed — jam antaŭ tio — kreis universitatan fakon, kiu liveras kvalifikitajn instruistojn. Ni ĉiuj aŭdis, ke en Francio jam de kelkaj jaroj (ekde 1979) oni elspezas amason da energio por venigi al la tagordo de la parlamento leĝproponon pri la instruado de Esperanto. Ankaŭ el Italio oni jam dudekon da jaroj aŭdas pri similaj klopodoj. En Francio la propono havas sencon, ĉar oni tie almenaŭ en tri universitatoj povas nun studi Esperanton, sed en Italio — kiom ni scias — ne ekzistas tia ebleco.

Iu devus internacie kunordigi la lernejan agadon. Iu devus tiri la internacie uzeblajn lecionojn el la hungara kaj ĉina spertoj. Tion oni atendas unuavice de la



La lerneja instruado de Esperanto ankoraŭ okazas ĉefe eksterprograme, kiel libervola aktiveco.

faka organizaĵo Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) sed ankaŭ de UEA kaj de ties landaj asocioj. Tamen, por ke tio okazu, necesas, ke la rilatoj inter ILEI kaj UEA moviĝu de la preskaŭ nula punkto, kie ili persiste restas dum la lastaj dek jaroj.

sm

Sesa Esperantologia Konferenco

En la kadro de la venonta Universala Kongreso en Budapeŝto okazos la 6a Esperantologia Konferenco. Kiel konstateble, tiu speciala aranĝo fariĝas jam tradicia parto de la kongresa programo, en kiu ĝi ne mankis de post la 63a UK en Varno en 1978.

La Konferenco en Budapeŝto havos ĝeneralan temon: "Fakleksiko en Esperanto". Ĝin pri zorgos la Fakto "Esperanto — Lingvo kaj Literaturo" de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko, en la Scienca Universitato Eötvös Loránd, kies gvidanto estas asista universitata profesoro d-ro István Szerdahelyi, jam vaste konata en la esperantologiaj rondoj. La rekta afergvidanto de la 6a Esperantologia Konferenco estos d-ro Wacha Balázs.

Oni klopodos veki intereson ĉe neesperantistaj lingvistoj pri aparta prezento de Esperanto kaj de la Kongreso.

Proponojn pri prelegoj por la Konferenco bonvolu sendi al jena adreso: Eötvös Loránd Tudományegyetem, Bölcsészettudományi Kar, Postafiók 107, H-1364 Budapest, Hungario.



Abundas gelernantoj sed mankas instruistoj

Kvin novaj akademianoj

Lastatempa komuniko sciigas, ke la Akademio de Esperanto havas kvin novajn membrojn. Ili estas **Probal Daŝgupto** (vic-profesoro pri sanskritidaj lingvoj en Puneo, Hinda Unio), **Bernard Golden** (arkeologo en Veszprém, Hungario), **Li Shijun** (tradukisto en Pekino, Ĉinio), **Bruce Arne Sherwood** (vicdirektoro de esploralaboratorio pri komputila instruado en Urbana, Usono) kaj **Humphrey Tonkin** (profesoro pri angla literaturo en Filadelfio, Usono). La komuniko informas ankaŭ pri la reelekto de 12 jamaj akademianoj, kies membreco (same kiel tiu de la kvin novaj) daŭros pliajn naŭ jarojn (1983-1991).

Ni rerigardis al la plena membrolisto de la Akademio (paĝo 63 de la Jarlibro de UEA por 1982), elprenis de tie la nomon de la forpasinta akademiano Bugge-Paulsen, aldonis la novajn membrojn kaj provis iom analizi la konsiston de la ĉefa lingva institucio de Esperanto.

Iam estis disvastigita la opinio, ke francoj "regas" en la Akademio. Tio nun certe ne plu ĝustas, ĉar el entute 46 akademianoj nur 5 estas denaskaj parolantoj de la franca lingvo. Se iu nun tiasence regas la Akademion, tio devus esti la anglalingvanoj, kies nombro estas 12, kaj tio proksimiĝas al kvarono de la

tuta akademia membraro. Fakte, 23 akademianoj (do, precize duono) estas denaskaj parolantoj de la ĝermanaj lingvoj (afrikansa 1, angla 12, dana 1, germana 3, islanda 1, nederlanda 2, norvega 2 kaj sveda 1), kompare kun 12 parolantoj de la romanidaj lingvoj, 6 de la slavaj, 4 de neeŭropaj lingvoj kaj 1 parolanto de finn-ugra lingvo. Ankaŭ geografie la Akademio estas tro eŭropa, ĉar nur 11 membroj loĝas ekster Eŭropo (kvankam pluraj el ili estas elmigrintaj eŭropanoj). Tiurilate estas aparte bonvena la nuna elekto de la akademianoj Daŝgupto kaj Li Shijun, kies ĉeesto en la Akademio iom mildigas ĝian emfaze eŭropan konsiston.

Ni eluzu ĉi tiun okazon ankaŭ por menci, ke la nomo "Akademio" aperis en la Movado antaŭ 75 jaroj, en 1908, kiam Akademio fakte estis iaspeca 12-membra labororgano de la Lingva Komitato, kiu kreiĝis en 1905 kaj nombris centon da membroj. La Lingva Komitato ekzistis ĝis la Dua Mondmilito. La nuna Akademio de Esperanto kreiĝis en 1948 kaj, laŭ sia statuto, ĝi povas havi maksimume 50 membrojn. Tiu statuto (akceptita en 1964) difinas, ke la ĉefa tasko de la Akademio estas "konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon".

D-ro Werner Bormann, kiu dum la lastaj monatoj plenumas la sekretarian taskon en la Akademio, informas, ke baldaŭ sekvos la elektoj por la estraro de la ĉefa Esperanta lingva institucio.

LINGVO

Makedono aŭ/kaj makedono?

En *Esperanto* (novembro 1982, p. 192) aperis recenzo pri *Makedona Antologio* kaj *Por la makedona lingvo*. La recenzinto, Klaus Schubert, uzis la saman gentonomon, "makedono", por 1. loĝantoj de la nuntempa respubliko de Jugoslavio, Makedonio, kies lingvo estas la makedona, kaj ankaŭ uzantoj de la sama sudslava lingvo parolata en partoj de Bulgario, Grekio kaj Albanio, kaj 2. antikva popolo, kies plej fama reprezentanto estis Aleksandro la Granda. Jen la citaĵo: "Tamen, en la 6a jarcento, la origine greklingvaj makedonoj per slava almigro fariĝis anoj de la granda regiono de sudslavaj dialektoj." Kiu konsultas la vortarojn Esperantan-bulgaran (1963), Esperantan-makedonan (1977) kaj Esperantan-serbokroatan (1979) trovos, ke **du** gentonomoj estas registritaj, "makedono" kaj "makedono". *Plena ilustrita vortaro (PIV)*, kontraŭe al la lingvouzo en la recenzo, registras kun prefero la forman "makedono", kiu estas

ĉefgento loĝanta en Macedonujo, t.e. la antikva lando. Ankaŭ la formo "makedono" troviĝas en *PIV* sed kun resendo al "macedono" sen plia klarigo. Sub la sama kapvorto estas la difino de "Macedonio/Macedonujo": "montara regiono norde de Grekujo, reĝlando en la antikva tempo, nun dividita inter Jugoslavio, Bulgarujo kaj Grekujo." Oni supozeble devas formi la nomon de la nunaj loĝantoj de tiu regiono per la sufikso "-an": "macedoniano" aŭ "macedonujano". Tiel ĝi kontrastas kun "makedono", la nomo de la antikva gento.

La tri slavaj vortaroj akordas pri la uzo de "makedono" kaj "Macedonio" por la historiaj popolo kaj lando, kaj "makedon" kaj "Makedonio" por la

Se via abono por 1983 ankoraŭ ne estas pagita, la aprila revunumero ne venos al via adreso. Ni ja fidas niajn malnovajn abonantojn kaj sendas al ili la unuajn tri numerojn ĉiujare, sed fine de marto elĉerpiĝas la tiurilata pacienco pri la pago. Pensu do pri tio!

modernaj. Tiu ĉi simetrio havas paralelaĵon en la historiaj nomoj "traco" kaj "Tracujo" kaj "trako" kaj "Trakujo" aŭ "Trakio", ambaŭ registritaj en *PIV*. "Traco" estas ĉefgento loĝanta en regiono norde de Helenujo, t.e. la antikva Grekio, dum "trako" estas loĝanto de la suda parto de la hodiaŭa Bulgario. Ne estas kompreneble, kial *PIV* uzas apartajn terminojn por antikva kaj moderna popoloj en unu parto de Balkanio sed rifuzas fari simetrian paron rilate la nomojn de aliaj samregionaj popoloj. Ĝis antaŭ nelonge la radikoj "macedon-" kaj "makedon-" havis malstabilan historion en Esperanto. La unuaj verkan-toj, inkluzive Zamenhof, uzis la formon "macedon-", sed kelkaj fruaj vortaroj, kiujn mi povis konsulti, enhavas nur "makedon-". Nur lastatempe oni trovis rimedon por eviti ambiguecon per la uzo de ambaŭ radikoj. Oni devas nur memori, ke la formo kun "c" estas antikva kaj tiu kun "k" estas moderna.

Bernard Golden

Esperanto 30 jarojn en Radio Zagreb

Dum tiuj forflugintaj — por kelkaj rapide, por aliaj malrapide — 30 jaroj (1953-1983), nur tri aferoj en la Esperantaj elsendoj de Radio Zagreb (Jugoslavio) restis la samaj: la programo okazis nur unufoje semajne, la elsendo aŭdeblas pere de mezaj ondoj, ili okazas malfrue (noktomeze).

La gvidantoj de la programo estis malmultaj (tamen kelkaj), parolistoj pluraj, kunlaborantoj tre diversnivelaĵ, redaktoro nome de Radio Zagreb nur dum la lastaj kvar jaroj.

Ne estas facile elteni 30 jarojn en la sino de grava neesperantista instanco, por kiu la movadaj interesoj estas sufiĉe malproksimaj.

Preskaŭ 1 600 elsendoj, parolitaj dum 377 horoj aŭ — kunligite — 15 tagojn kaj noktojn seninterrompe. La elsendotekstoj, se konservitaj, ampleksus kelkajn librojn, ne maldikajn.

Radioprogramoj estas multe pli internaciaj, ol tiuj de la televido. Sur ĉiu radioricevilo la elsendoj deko-ble plimultas ol la programelekto sur la televidiloj. Esperantaj radioprogramoj tro malmultas, tutaj kontinentoj estas eĉ sen unu sola Esperanta elsendo. Ĉirilate la organizaj fortoj de la Movado devus intensigi sian agadon.

Aŭskulti radioprogramon estas la plej komforta kaj la malplej temporaba maniero esti en kontakto kun Esperanto, sen devo eliri el sia hejmo, povante kuŝi en la propra lito, sen bezono lacigi la okulojn per legado, por tamen aŭdi, kio novas, kion enhavas la lastaj numeroj de gazetoj, kiel sukcesis diversaj kongresoj kaj renkontiĝoj.

Ĉu vi aŭskultas Esperantajn radioprogramojn?

Provu foje marde ĝustigi vian radioricevilon al la ondolongo 262m, je la 23 h 45 laŭ la Mez-Eŭropa Tempo. Vi aŭdos: "Parolas Radio Zagreb", kaj ĉe la fino, "Bonan nokton!" deziros al vi

Emilija Lapenna.



En unu el la programfarejoj de Radio Zagreb (de maldekstre): Vlado Jurković kaj Emilija Lapenna (ambaŭ ligitaj 30 jarojn el ĉi tiuj Esperantaj programoj), Tomislav Radić (respondeca redaktoro de la Esperantaj elsendoj) kaj Damir Mikulić (parolisto)

Louis Beaucaire

1925-1983

La 18an de februaro 1983, en Berlino forpasis Louis Beaucaire, unu el la plej popularaj aŭtoroj de la pli nova Esperanta literaturo. Li naskiĝis la 7an de februaro en Montbarrey (Francio), sed en 1950 ekloĝis en Berlino, kie li gvidis francan librovendejon.

Beaucaire lernis Esperanton en 1941, iom verkis en diversaj movadaj periodaĵoj kaj aktivis precipe je la loka nivelo. Lia unua libroforma verko, *Kruko kaj Baniko el Bervalo*, aperis en 1970 ĉe TK en Kopenhago. Tiu kolekto de "maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj" baldaŭ fariĝis tiel populara, ke necesis reeldono en 1974, por nun denove atendi represon. La dua libro de Beaucaire estis *El la vivo de bervalasentaŭgulo*, aperinta ĉe J. Régulo en 1974, konsistanta el 12 "maldecaj epizodoj", kiuj milde kaj elegante satiras pri la Esperanto-movado. Ankaŭ la tria libro, *Fabeloj de la verda pigo* (TK/Stafeto, 1981), enhavas 12 satirojn pri movadaj temoj.

Beaucaire estas kvazaŭ aparta skolo en la Esperanta literaturo, gaja sed neniel fontanta el la verkaro de la alia franca bonvivulo, R. Schwartz. Beaucaire volis distri kaj mem pretendis esti ano de la leĝera ĝenro en la Esperanta literaturo. Per siaj tri libroj, li fakte fariĝis unu el la ĉefaj reprezentantoj de tiu nia literatura ĝenro. Aparta trajto de lia talento estis la



kapablo verki en flua kaj leĝera stilo, kiu plurrilate signifas sukcesan elprovon de Esperanto en tiu sfero. Se la nombro de la legantoj estas grava juĝo pri verkisto, tiam Louis Beaucaire apartenas al la plej ŝatataj aŭtoroj en la Internacia Lingvo.

Beaucaire estis multjara fidela membro de UEA, kiun li ankaŭ finance subtenis.

LIBROMERKATO

Kio pleje vendiĝis

Jen ĉi-sube nia tradicia listo de la libroj, kiuj pleje vendiĝis tra la Libroservo de UEA dum la jaro 1982:

1. *Plena analiza gramatiko* (Kalocsay kaj Waringhien) 48,00
2. *The Esperanto Movement* (Forster) . . . 33,90
3. *Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof* (Ludovikito, pseŭd.) 33,00
4. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (Wells) 12,00
5. *Tutmonda sonoro* (Kalocsay) 66,00
6. *El subaj fontoj* (Urbanová) 4,80
7. *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto* (Lo Jacomo) 39,00
8. *Plena ilustrita vortaro* (Waringhien k.a.) 129,00
9. *Vereco distro stilo; Romanoj en Esperanto* (Auld) 23,10
10. *Esperanto and English Dictionary* (Wells) 22,50
11. *Esperanto en perspektivo* (Lapenna, Lins, Carlevaro) 84,00

12. *La luzidoj* (Camões) 39,30
13. *Pretertempe* (de' Giorgi) 18,00
14. *Elektitaj satiroj* (Kiŝon) 16,80
15. *Plena vortaro* (Grosjean-Maupin k.a.) . . 27,00
16. *Misio sen alveno* (Francis) 24,00
17. *La sonetoj / The sonnets* (Ŝekspiro) . . 40,20
18. *Paŝoj al plena posedo* (Auld) 20,80
19. *Fabeloj de la verda pigo* (Beaucaire) . . . 19,80
20. *La litomiŝla tombejo* (Piĉ) 48,00

Kiel sciante, nian liston eniras nur la unuopaj (senrabataj) vendoj, kiuj iras rekte al niaj klientoj, kaj ne al aliaj revendistoj. Se ni jam kutimiĝis rigardi ĉi tiun liston (cetere, la solan ĉi-specan superrigardon en la Movado) kiel ian indikilon pri la Esperanta libromerkato, ni provu iom komenti ĝin.

Certe ne estas surprizo, ke *Plena analiza gramatiko* ankaŭ ĉi-jare konservas sian unuan lokon (kiel en 1981), ĉar ĝi ankoraŭ estas freŝa en la merkato (ĝi aperis en 1980). Krome, simile al *Plena ilustrita vortaro* kaj *Plena vortaro*, ĝi estas unu el tiuj bazaj ĉefverkoj de la Internacia Lingvo, kiuj troviĝos en simlistoj ĉiam kiam ili ĉeestos en la merkato. →

La surprizo de la ĉi-jara listo sendube estas la sociologia studo de Peter G. Forster — *The Esperanto Movement* —, kiu okupas la duan lokon, ĉar al ĝi mankis nur kelkaj poentoj por okupi la unuan. Ankaŭ la trian kaj kvaran lokojn okupas zamenhofologia kaj esperantologia studoj de Ludovikito kaj Wells. Ŝajnas laŭ la listo, ke tiaj verkoj trovas pli da intereso ĉe la aĉetantoj, ol tion sukcesas fari beletraĵoj, kiuj elbatalis nur 9 lokojn, plejparte en la suba parto de la 20-era listo. Ni ne surpriziĝas, ke unu el la ĉefverkoj de Kalocsay — *Tutmonda sonoro* — estas la unua beletraĵo en la listo. Kiel bela surprizo tamen venas la tuj posta loko, kiun okupis la ĉeĥa poetino Urbanová per sia dua poezia volumo, *El subaj fontoj*.

Kiel ĝenerale fartis la librovendado ĉe UEA pasintjare? Ne aparte ekscite. La vendoj restis iom

sub 200 000 guldenoj, kio estas je kelkdeko da miloj malpli ol en 1981. La kaŭzo estas tre simpla: UEA ne lanĉis dum la pasinta jaro eĉ unu novan libron, kvankam tuta fasko da titoloj estis atendataj kiel el la Grafika Centro en Antverpeno, tiel el la Scienca Eldona Centro en Budapeŝto. Nun tamen ŝajnas, ke UEA en ĉi tiu jaro kvazaŭ inundos la merkaton per pluraj libroj, kiuj estas komplete pretaj kaj jam presataj aŭ tre baldaŭ eldonotaj, ĉu en Antverpeno, ĉu en Budapeŝto. Inter ili troviĝas ankaŭ la longe atendata legolibro *Faktoj kaj fantazioj* de d-rino Marjorie Boulton. Fine de ĉi tiu jaro oni povus atendi ankaŭ la novan, reviziitan kaj kompletigitan eldonon de *Esperanta antologio*, sub la redakto de William Auld. La libro fakte jam estas kompostita en Pekino, kaj ĝi aperos kiel frukto de valora kunlaboro inter ĈEL kaj UEA.

ESPERANTOLOGIO

Ni bezonas dialektologion de Esperanto

Ekde 1980, kadre de mia universitata studado kiel slavisto, mi esploris la "rusan dialekton" de Esperanto: en la skriba kaj parola lingvouzo de rusaj esperantistoj, mi interesiĝis pri la specifaĵoj kaŭzataj de influo de la gepatra lingvo. Parta rezulto de mia esplorado estis magistriga disertacieto (*mémoire de maîtrise*) pri "Rusaj influoj en Esperanto ĉe ruslingvaj esperantistoj en la sfero de verba morfologio", kiu estis akceptita la 1-an de decembro 1982 kun mencio "bone". La jena artikolo estas parta adapto de la enkonduko de tiu disertacieto, en kiu mi reliefigas la gravecon de dialektologia aliro al Esperanto kiel fundamenta parto de esperantologio. Tiu vidpunkto eble ŝokos iujn, aŭ multajn, esperantistojn... kaj mi estus kontenta, se ĝi povus provoki debaton pri demando iom tikla, kiun oni ĝis nun preferis prisilenti en la Esperanto-medio: ĉu Esperanto submetiĝas al dialekta (geografia) variado? kaj kiomgrade oni povas akcepti tiun variadon?

Geografia variado de Esperanto

Estas tute nature, ke Esperanto varias sub influo de la gepatraj lingvoj de siaj parolantoj. Simila fenomeno konstateblas ĉiufoje, kiam la scipovo de iu lingvo rezultas el malfrua lernado kaj aldoniĝas al la gepatra lingvo de la parolanto. Tamen, en Esperanto, tiu fenomeno alprenas tute apartajn formojn, ĉar:

- Esperanto estas verŝajne la plej juna el ĉiuj vivantaj lingvoj;
- ĝi estas laŭnature dua lingvo por ĉiuj siaj parolantoj, krom por neglektebla proporcio da denaskaj esperantistoj;
- la Esperanta komunumo estas ia lingva diasporo,

en kiu komunikado ne atingas la saman kvantan nivelon, kiel en geografie homogenaj lingvaj komunumoj. La nombro de esperantistoj, kiuj uzas la lingvon en sia ĉiutaga vivo, estas treege malgranda. La plejmulto uzas Esperanton precipe pasive, per legado kaj radioaŭskultado. Skriba komunikado estas la plej disvastigita: esperantistoj ofte havas unu aŭ plurajn eksterlandajn korespondantojn. Parola komunikado ofte limiĝas al diskutado en lokaj grupoj, inter homoj de sama gepatra lingvo. Nur eta nombro da privilegiuloj (eble kelkaj miloj) povas uzi la lingvon parole en internacia medio, okaze de la internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj, kelkajn tagojn ĉiujare; – ne ekzistas klare difinita normo (pri tio ni reparolos poste).

Ĉu paŭs-lingvo aŭ memstara sistemo?

Pro ĉiuj ĉi faktoroj, la influo de la gepatra lingvo en Esperanto ne estas flanka fenomeno, sed integra parto de la lingvo-sistemo. En honesta priskribo de Esperanto oni devus distingi du ĉefajn kontraŭajn tendencojn, kiuj trakuras la tutan lingvon, nome:

1. ĉiumomenta modeliĝo laŭ la etnaj lingvoj, kaj
2. obeado al memstara normo.

Unu el la ĉefaj demandoj, kiujn devus solvi la esperantologoj, estas difini la ekvilibron inter tiuj du tendencoj. Alivorte: kiomgrade Esperanto estas paŭs-lingvo? kiomgrade ĝi havas memstaran funkciadon?

Laŭ historia vidpunkto, ni povas aserti, ke Esperanto naskiĝis kiel paŭs-lingvo, kaj memstara normo iom post iom kreiĝis. En la Unua Libro por Rusoj, Zamenhof eksplicite prezentas Esperanton kiel sim-



Diverskontinentaj parolantoj de Esperanto ne frontas problemojn pro la malsameco de siaj "dialektoj"

plan sistemon, per kiu oni povas transigi tekston de font-lingvo al cel-lingvo, per simpla ĉifra-deĉifra proceso:

"Mi troviĝis en Rusujo, ne sciante eĉ unu vorton rusan; mi bezonas turni min al iu, kaj mi skribas al li sur papereto en libera lingvo internacia ekzemple la jenon:

Mi ne sci'as, kie mi las'is mi'a'n baston'o'n; ĉu vi ĝi'n ne vid'is?

Mi proponas al mia interparolanto vortaron internacia-rusan kaj mi montras al li la komencon, kie per grandaj literoj estas presita la sekvanta frazo: Ĉion, kio estas skribita en la lingvo internacia, oni povas kompreni per helpo de tiu ĉi vortaro. (...)

Se mia interparolanto neniam aŭdis pri la lingvo internacia, li komence rigardos min tre mirigite, sed li prenos mian papereton, serĉos en la montrita maniero en la vortaro kaj trovos jenon:

Mi	ja	ja
ne	ne, net	ne
sci	znat'	} znaju
as	oznaĉaet nastojaŝĉee	
	vremja glagola	
kie	gde	gde
mi	ja	ja
las	ostavljat'	} ostavil
is	oznaĉaet proŝedŝee	
	vremja	
mi	ja	} (moj) moju
a	oznaĉaet prilagatel'noe	
n	oznaĉaet vinitel'nyj padeŝ	
baston	palka	} palku
o	oznaĉaet suŝĉestvitel'noe	
n	oznaĉaet vinitel'nyj padeŝ	
(...)		

En tia maniero la ruso klare komprenos, kion mi de li deziras."

Tiu skemo ankoraŭ nun interesas kelkajn esplorantojn de aŭtomata (komputila) tradukado; ĝi ja aspektas kreita speciale por tiu ĉi celo, kvankam sesdekon da jaroj antaŭ la unuaj komputiloj! Tamen konstatablas, ke Esperanto tre malbone funkcias kiel pont-lingvo en aŭtomata tradukado. Ĝi dume fariĝis vera vivanta lingvo. La skemo funkcias por simplaj mesaĝoj, sed ja ne povus esti aplikata al pli kompleksaj mesaĝoj. Do ne estas mirige, ke la lingvo tuj eliris el tiu kadro kaj ekserĉis sian propran vojon. Zamenhof skribas en 1906: "La stilo Esperanta ne imitas blinde la stilojn de aliaj lingvoj, sed havas sian karakteron tute **specialan** kaj **memstaran**, kiu ellaboriĝis en la daŭro de longa praktikado de la lingvo kaj pensado en tiu ĉi lingvo antaŭ ol la lingvo estis publikigita." ("Respondoj de d-ro L.L. Zamenhof," en *La Revuo*, n-ro 4 (decembro) 1906, p. 187-189). Cetere tiu frazo pravas, ke Zamenhof donis en la Unua Libro priskribon taktikan, kiu ne koincidis kun lia vera intenco.

Ĉiukaze, pro la (intenca) malprecizeco de la unua priskribo, la lingvo povis funkcii komence nur per imito de la etnaj lingvoj. Oni povas aserti, ke la nuna Esperanto rezultas el sinsekvo de etnolingvaj influoj, kiuj variis laŭ la disvastiĝo de la Movado en pli kaj pli da landoj. Tiel sinsekvis influoj slavaj, francaj... Nun, kiam la Movado akiras kreskantan gravecon ekstereŭrope, oni ekvidas evidentajn indicojn de "maleŭropiĝo" en la sintakso; samtempe plioftiĝas kritikoj pri la antaŭaj lingvokutimoj, kiujn oni taksas tro eŭropeaj (vidu ekzemple: Claude Piron, "La okcidenta dialekto", en *Esperanto*, 1977, p. 125; Matazi Kido, "Naciismoj en Esperanto", en la raporto pri la Simpozio "Gepatralingvaj influoj en Esperanto", Illinois-Universitato, Urbana-Champaign, 1980).

Tamen oni devas klare distingi tiun historian imitadon de etnaj lingvoj disde la **individuaj** influoj de la gepatra lingvo, kvankam tiuj ĉi estas la motoro de la unuaj. Individua influo daŭre okazas; en la landoj, kie esperantistoj formas fortan komunumon, la individuaj influoj estas homogenaj, ili povas kuniĝi kaj kunefiki al la ĝenerala lingvouzo; kaj restas en la lingvo tiuj kolektivaj influoj, kiuj kontribuas al la ellaboriĝo de internacia normo.

La ekvilibro inter normo-obeado kaj analogia funkciado varias ankaŭ sinkrone: ne ĉiuj esperantistoj havas saman sintenon rilate al la normo.

Mi konsideras (eble arbitre), ke la normo estas plej forta ĉe la esperantistoj, kiuj havas oftajn personajn kontaktojn kun alilandanoj, ekzemple en internaciaj kongresoj. Nur en tiuj kondiĉoj Esperanto vere plenumas sian rolon de komunikilo, kaj la unuopaj etnolingvaj influoj povas neŭtraliĝi. Tiuj esperantistoj konsistigas minoritaton, kvankam aktivan: ili

disradias sian lingvouzon per verkado de libroj, redaktado de revuoj, parolado en radio, prezentado de teatraĵoj ktp.

Ekster tiu normo-portanta grupo, la ekvilibro inter normo-obeado kaj gepatrlingva influo varias laŭ multaj faktoroj: grado de lingvo-kompetenteco, scipovo de aliaj lingvoj, enplektiteco en internaciaj informfluo per Esperanto ktp. En kelkaj landoj la esperantistoj estas preskaŭ izolitaj disde la internacia Movado, pro kaŭzoj jen geografiaj, jen politikaj. En tiaj landoj Esperanto funkcias en fermita rondo, kaj apartaj lingvouzoj povas tie disvolviĝi.

Kie estas la normo?

Konstatinte la relativecon de la rolo de normo en Esperanto, ni tamen devus difini ĝin. Sed ĉi tie aperas tre ĝena obstaklo: apenaŭ ekzistas fidinda priskribo de ĝi. La Fundamento estas la sola universale akcep-



T. Bormann (FR Germanio) kaj C.R.L. Power (Usono): Ĉu ili parolas du "dialektojn" de la Internacia Lingvo?

tita normigilo, sed ĝi ja ne priskribas la tutan lingvon, kaj lasas multajn "blankojn" plenigatajn de ne ĉiam homogena lingvo-tradicio. La postaj normigaj verkoj, *PIV* kaj *PAG*, ne ĉiam prezentas la nunan lingvouzon kaj certe ne ĝuas sufiĉan aŭtoritaton por nekontesteble gvidi la lingvon.

Konkludo

Laŭ mi, esperantologio devus disiĝi en du branĉojn: la unua priskribu la norman Esperanton, kaj la dua studu la analogian funkciadon, el vidpunkto simila al dialektologio.

En la etnaj lingvoj normopriskribado estas multe pli disvolvita ol dialektologia priskribado. Tio estas eĉ pli okulfrapa en Esperanto: ĝia geografia variado estas ĝis nun apenaŭ esplorita, kvankam la koncernaj fenomenoj havas multe pli grandan gravecon, ol en la etnaj lingvoj. Ŝajnas, ke krom la tradicia ignorado pri dialektologio fare de lingvistoj, ekzistas en Esperanto aparta malŝato fontanta el varbadaj bezonoj: estus malbona strategio agnoski fenomenojn, kiujn iuj povus analizi kiel misfunkciadon de Esperanto, kiam

oni klopodas konvinki la mondon, ke Esperanto estas "normala" lingvo. Verŝajne pro tio la maloftaj studoj, kiuj pritraktis la problemon (ekzemple la artikoloj de Bernard Golden pri la "hungara dialekto"), havas **preskribajn** celojn: oni ja priskribas la apartajn karakterizaĵojn de iu nacia esperantistaro, sed kun la intenco atentigi pri "eraroj" kaj "devojiĝoj" kaj instigo kontraŭbatali tiujn "erarojn". Iusence, Esperanto-dialektologio ankoraŭ ne venkis la "infanan malsanon" de ĉiuj etnolingvaj dialektologioj, kiuj komence havis similajn preskribajn zorgojn.

Nu, esperantologoj havas tamen bonan senkulpiĝon: la studado de la gepatrlingvaj influoj en Esperanto dependas grandparte de la esplorado de la influanta etno-lingvo. Esperanto povas servi kiel iuspeca "rivelilo", per kiu oni povas distingi en la influanta lingvo iujn fenomenojn, kiuj restas en ĝi kaŝitaj de tro konata formo. En sia analogia funkciado, Esperanto certgrade ofertas travideblan formaligon de la kategorioj de la influanta lingvo. Esplorado de la gepatrlingvaj influoj povas do esti tre utila: ĝi povas, ekzemple, kontribui al starigo de hierarkio inter diversaj lingvoniveleoj, surbaze de iliaj respektivaj influoj en Esperanto.

Aldono:

La problemo de interdialekta interkompreniĝo

Miaj pripensoj povus ŝajni iom negativaj: geografia variado de Esperanto estas nekontestebla kaj neevitebla; ĉu tio do signifas, ke la fifama "disdialektiĝo", kiun tiel timas la esperantistoj, estas fatala?

Al tio mi respondu: jes, sed tio tute ne gravas! "Disdialektiĝo" ne signifas "dislingviĝo", ĉar la karakterizo de plurdialekta lingvo (tio estas pleonasmo, ĉar ĉiu lingvo estas plurdialekta, ne ekzistas ideale homogena lingvo) estas la ebleco de interdialekta interkompreniĝo. "La problemo de interdialekta interkompreniĝo en Esperanto" ĝuste estas la temo de mia verkota doktora disertaĵo, do mi povos prezenti kompletan studon nur post kelkaj jaroj. Sed intuicie ni jam povas diri: interkompreniĝo inter malsamdevenaj esperantistoj ja **ĝenerale** eblas (kelkfoje post iom da alkutimiĝo, sed tio okazas ankaŭ en etnaj lingvoj), Esperanto efektive funkcias en interetna komunikado. Sed kiel certiĝi, ke tiu interkompreniĝo plu daŭros post cent aŭ ducent jaroj? Tio ja ne dependas de ni, nek de iu ajn akademio, Fundamento aŭ alispeca aŭtoritato: se internacia komunikado pere de Esperanto restos sub iu certa nivelo, t.e. se Esperanto ne respondos al iu vera **bezono**, nu, tiam certe estas neniu kialo, por ke la lingvo restu homogena kaj certigu facilan interkompreniĝon. Se, male, Esperanto estos intense uzata en interetnaj informfluo, tiam la dialektaj diferencoj aŭtomate restos ĉe akceptebla nivelo.

Alain Dawson

Renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj, kunvenoj, kursoj...

Tutjare

Internacia Esperanto-Kursejo, Smoljan, Bulgario (Pk. 791, BG-1090 Sofia) organizas kursojn, kulturajn kaj turismajn aranĝojn tra la tuta jaro.

Internacia Esperanto-Kursejo, Varna, Bulgario (Pk. 791, BG-1090 Sofia), organizas Esperanto-kursojn tra la tuta jaro. Esperanto-Oazo, Gandia, Hispanio (A. Sanz, Apartado 171, Gandia, Valencia) tutjare akceptas feriantojn.

Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) tra la tuta jaro aranĝas diversgradajn Esperanto-kursojn, studsemajnojn, prelegojn ktp.

Internacia Esperanto-Lernejo, Bydgoszcz kaj Toruń, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz) havas diversajn instruajn kaj feriajn aranĝojn tra la tuta jaro.

24/05-01 Seminario de KER de TEJO: Partopreno en amaskomunikado, Strasburgo, Francio (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

28 75-jara jubileo de UEA (kiu fondiĝis en 1908)

29/05-01 Biblia Semajnfino, V. Grüssau/Bad Wimpfen, FR Germanio (B. Eickhorn, Kolpingstr. 8, D-7790 Messkirch)

30/05-02 9a Renkontiĝo de E-Junularo, Brčko, Jugoslavio (Esperanto, V. Pelagića 8/1, YU-71000 Sarajevo)

30/05-02 Markola E-Kongreso, Folkstone, Britio (F. Randell, 5 Wiltie Gardens, Folkstone, Britio CT19 5AX)

30/05-03 16a Tutlanda Kunloĝado, Yaizu, Japanio (Esperanto-Domo, Sone-bil. 502, 46-17, Sinzyuku P.O.Kesto 233, Tôkyô-to, 160-91 Japanio)

Majo

06-08 Zamenhofa Internacia Pacmarŝo, Börsöny apud Zebegegy, Hungario (BK de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)

12-15 Jarkongreso de Sveda E-Federacio, Gävle (SEF, Brunnsgatan 21, S-11138 Stockholm)

12-15 Seminario pri Nova Biologia Nomenklatur (NBN), Nieuwpoort, Belgio (NBN, Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout)

12-15 Renkontiĝo de NEJ/GEJ, Ruinen, Nederlando (M. Creuwels, Balijelaan 16, 3521 GR Utrecht)

13-27 Karuselvojaĝo 83: Belgio, Germanio, Pollando kaj reen, (Eŭropa E-Centro, Montoyerstr. 37, b. 24, B-1040 Bruxelles)

20-23 61a Germana E-Kongreso, Bad Säckingen, FR Germanio



Aprilo

15-17 Bavara E-Renkontiĝo, Pfaffenhofen, FR Germanio (BEL, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg)

16-23 Feriosemajno de TANEF, Bergen aan Zee, Nederlando (M. Beijne, Vijf Meilaan 131, 2321 RK Leiden)

19-24 Staĝo por progresantoj, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds). Similaj aranĝoj preskaŭ ĉiumonate en 1983.

22-24 Semajnfino de GEJ, Neustadtgödens, FR Germanio (W. Hinichs, Staust. 14, D-2946 Neustadtgödens)

22-24 Kultura Semajnfino de Luksemburga E-Asocio kaj 42a Kongreso de E-Federacio de Orienta Francio, Luksemburgo (C. Nourmont, 3 rue Kleppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo)

nio (R. Reuchlin, T 6/18, D-6800 Mannheim 1)

20-27 Renkontiĝo de Juneco, Vinkovci, Jugoslavio (Z. Pehar, Opatijska 41, YU-54000 Osijek)

20-29 Internacia Luda Seminario, Renesse, Nederlando (E. Bick, Fasanenweg 11, D-5300 Bonn 1, FR Germanio)

26-30 Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj, Toruń, Pollando (Muzeum Etnograficzne, Sały Sikorskiego 19, PL-87-100 Toruń)

27-29 21a Kultura Semajnfino, Homberg-Saar, FR Germanio (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)

27-29 78a Skota E-Kongreso, Biggar, Skotlando (A. Eyre, 17 Kelvin Gardens, Hamilton, Britio ML3 9NR)

28/06-05 Folkloraj kaj Muzikaj Esperanto-Festivaloj, Toruń-Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)


Junio

- 01-05 Esperantaj tagoj de Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 02-05 Scienca E-Seminario, Karlovo, Bulgario (B. Leonov, pk 44, Karlovo)
- 04-10 35a IFEF-Kongreso, Oostende, Belgio (L. De Sutter, Chemin des Pins 4, B-1180 Bruxelles)
- 10-12 Somernokta Festo de GEJ, Neustadtgödens, FR Germanio (W. Hinrichs, Staust. 14, D-2946 Neustadtgödens)
- 11-12 31a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, Ikeda, Japanio (KLEG, Sone-higasi, 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ōsaka-hu, Kyôto, 606, Japanio)
- 11-18 Kvakera E-Renkontiĝo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (M. Davies, 69 Twemlow Parade, Morecambe, Britio LA3 2 AL)
- 17-19 48a Norvega E-Kongreso, Draman (NEL, Olaf Schous vei 18, Oslo 5)
- 19-26 Internacia Kuirarta Konkurso, Istanbul-Bursa, Turkio (Matur Turizm, İnönü Nro 15/1, Bursa)
- 22-26 25a Kanada Kongreso de Esperanto, Peterboro, Kanado (R. Eichholz, Baillieboro, Ont. KOL 1BO)
- 23-28 Internacia Turisma Renkontiĝo, Ercmontaro, Ĉeĥoslovakio (J. Klement, Kpt. Nlepy 7, CS-360 04 Karlovy Vary-Bohatice)
- 25/07-02 Internacia Esperanto-Semajno, Cannes, Francio (Llorens, "Les Hortensias 2", 121 bis, Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice)
- 27/07-23 Junulara E-Tendaro, Bjalistoko, Pollando (PEA, pk. 67, PL-15-001 Bjalistoko)


Julio

- 01-15 Kurso por Instruistoj de Esperanto, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 01-16 5a Centra E-Laborbrigado, Szentendre, Hungario (HEJ, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 02-22 Prelegoj kaj Kursoj, Baugé, Francio (E-Domo, Château de Grésillon, F-49150 Baugé)
- 03-15 Interlingvistika kaj Esperantologia Forumo, La Chaux-de-Fonds (KCE, Pf 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)
- 04-13 Somera E-Lernejo, Tjentište, Jugoslavio (Esperanto, V. Pelagića 8/1, YU-71000 Sarajevo)
- 04-22 Intensivaj E-Kursoj, San Francisco, Usono (ELNA, P.O.Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 09-15 13a Amikeca Kongreso, Leutkirch/Allgäu, FR Germanio (S. Maul, Lindenstr. 5, D-7970 Leutkirch/Allgäu)
- 09-17 Studsemajno ĉe Lagobordo, Vääksy, Finnlando (H. Tietti, SF- 30940 Letku)
- 13-23 Bicikla Ekskurso, de Pasau en FR Germanio al Debrecen en Hungario (T. Bormann, Koppel 94, D-2000 Hamburg 1, FR Germanio)
- 14-22 17a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Sintra, Portugalio (S-ro F. Zaragoza Ruiz, Callosa de Segura, Alicante, Hispanio)
- 15-17 9a Kongreso de AESSR, Žilina, Ĉeĥoslovakio (L. Hanzel, Tr. obráncov mieru 25, CS-010 01 Žilina)
- 15-22 3a Franc-Germana Junulara Seminario, Altusried (Kempten), FR Germanio (E. Kuhl-Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen 1)
- 15-29 Infana Esperanto-Vilaĝo, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

- 19-22 Junulara E-Konferenco, Bydgoszcz, Pollando (PEJ, Jasna 6, PL-00-013 Warszawa)
- 20-25 43a Hispana E-Kongreso, Zaragoza, Hispanio (Hispana E-Federacio, Dos de Mayo 4, Valladolid-4)
- 20-29 Verda Olimpiko pri Ŝako, Kalocsa, Hungario (J. Németh, Szabó J.u. 3.I, H-6300 Kolocsa)
- 20-29 Internacia Renkontiĝo Naturamika, Pécs, Hungario (Pf.2, H-7601 Pécs)
- 21-24 16a Brazila Seminario de Esperanto, Ouro Preto — MG, Brazilo (Instituto de Esperanto, Rua Guajajaras, 410 — S/809, BR-30000 Belo Horizonte — MG)
- 22-26 31a Usona Kongreso de Esperanto, San Francisco (ELNA, P.O.Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 22-29 19a Pola E-Kongreso, Krakovo, Pollando (PEA, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1)
- 23-29 Tursima Semajno, Spišská Nová Ves, Ĉeĥoslovakio (Peter Pavúk, Jilemnického 17/9, CS-052 01 Spišská Ves)
- 23-30 Internacia Feriosemajno, Maria Alm, Aŭstrio (Max Finkenzeller, Troststrasse 27/10/2, A-1100, Wien)
- 23-30 39a Internacia Junulara Kongreso, Debrecen, Hungario (TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
- 23-30 Internacia Kristana E-Kongreso, Esztergom-Kertváros, Hungario (L. Hordijk, van Hogendorpl. 4, 3135 CD Vlaardingen, Nederlando)
- 24-30 Somera E-Universitato (21a sesio), Gyula, Hungario (SEU, 48-as u. 11, H-5700 Gyula)
- 25-29 4a Internacia Medicina E-Konferenco, Poprad, Ĉeĥoslovakio (J. Hradil, CS-295 01 Mnichove hradište)
- 25/08-07 Kursoj, Baugé, Francio (E-Domo, Château de Grésillon, F-49150 Baugé)
- 30/08-05 56a Kongreso de SAT, Linz, Aŭstrio (M. Hollinger, Gruberstr. 65, A-4020 Linz)



Kvankam la nomo de Hungario unuavice elvokas pejzaĝon de senfina ebenajo aŭ la plej okcidenta el la "aziaj" stepoj, la lando de la ĉefaj ĉi-jaraj movadaj manifestacioj havas surprizan diversecon de la vidindaĵoj kaj naturbelajoj, kiujn ĝuos la ekskursontoj de la 68a UK, 39a IJK kaj KELI-kongreso.



Budapeŝto ĉi-jare atendas milojn da esperantistoj, ĉar al la 68a Universala Kongreso verŝajne venos tiom da partoprenantoj, kiom troviĝos en la plimulto de la aliaj ĉi-jaraj movadaj aranĝoj: La fama Fiŝista Citadelo en la hungara ĉefurbo.

30/08-06 68a Universala Kongreso de Esperanto, Budapeŝto, Hungario (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

30/08-06 20a Infana Kongreso de Esperanto, Budapeŝto, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)

Aŭgusto

01-08 Internacia Tendaro por 10-14-jaruloj, Budapeŝto, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)

06-07 70a Kongreso de Japanaj E-istoj, Kameoka, Japanio (JEI, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio, 162 Japanio)

06-10 Ĉemara E-ista Kunlogado, Busano, Korea Resp. (KEA, CPO Box 4258, Seulo)

06-13 51a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Budapeŝto, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)

06-13 Postkongresa Feriosemajno, Vieno, Aŭstrio (Max Finkenzeller, Troststr. 27/10/2, A-1100 Wien)

07-14 Postkongreso en Zagreb kaj Zadar, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, P.p. 449, YU-41000 Zagreb)

08-20 Familia Komputista Ripoztendaro, Ahtopol, Bulgario (Komputista Grupo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario)

08-31 Arkeologia Laborbrigado, Debnevo, Bulgario (IEK, Pk 791, BG-1090 Sofia)

13-16 2a Renkontiĝo de Argentinejo, Puerto Rico, Argentino (E. Basilio, Casilla de Correo 78, Zona Rural, RA-2630 Firmat)

13-20 Familia Tendaro, Thomsdorf, Germana DR (W. Pfennig, Leibnizstr. 5/67, DDR-2000 Neubrandenburg)

17-30 2a Internacia Familia Feriado Międzygórze, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

22-27 10a Kongreso de Internacia Kibernetika Asocio, Namur, Belgio (Palais des Expositions, Place André Ryckmans, B-5000 Namur)

22/09-03 Renkonto de Blinduloj, Baugé, Francio (E-Domo, Château de Grésillon, F-49150 Baugé)

28/09-04 Preparseminario por la Kursgvidanta Ekzameno, Augsburg, FR Germanio (S. Tucker, Lilienthalstr. 3, D-8900 Augsburg)

Septembro

01-15 19a Internacia Feriado "Ora Pola Aŭtuno", Międzygórze, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

04-11 Internacia Feriosemajno, Zäziwil (Ementhal), Svislando (E. Döring, Pf. 225, CH-4003 Basel)

07-09 Skota Aŭtuna Studrondo, Dunblane, Britio (A. Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, Britio ML5 1LE)

09-11 Kongreso de Belga E-Federacio, Leuven, Belgio (Esperanto, Duisburgestr. 12, B-3030 Leuven Heverlee)

11-18 Internacia Semajno ĉe Mediteraneo, Sète, Francio (Esperanto, 5 rue Docteur Roux, F-34000 Montpellier)

12-25 Internacia Esperanto-Renkontiĝo, Krossinsee, Germana DR (Esperanto, Breite Str. 35,36, DDR 1020 Berlin)

19-29 Internacia E-Ferio, Velingrad, Bulgario (M. Ĉolev, B. Krastini 14, BG-4600 Velingrad)

20 Internacia tago de Paco (UN)

23-25 Seminario de Germana E-Instituto, Hamburg, FR Germanio (GEA, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld)

28/10-01 Sciencpraktika Konferenco, Vraca, Bulgario (IEK, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

Oktobro

01-02 Turisma Renkontiĝo, Sliven, Bulgario (I. Ĉernaev, Ul. Miĥail Baŝev 26, Dom Bragnevi, BG-8800 Sliven)

06-09 Pupteatra Internacia Festivalo (kun Internacia Infana Renkontiĝo), Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Amruŝeva 5, YU-41000 Zagreb)

08-09 5a Kongreso de E-Grupo Intermontara, Gallup, Nov-Meksikio, Usono (R. Stone, 2500 E. Aztec 35, Gallup, NM 87301)

09-15 Bicikla Ferio de JES, La Chaux-de-Fonds, Svislando (JES, Pf. 771, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)

14-16 Konferenco de Bavara E-Ligo, Bamberg, FR Germanio (BEL, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg)

21-30 9a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

28-30 FLEJA-Renkontiĝo, Wavre, Belgio (W. Tytgat, St. Hathebrandstr. 8, B-2510 Mortselt)

28/11-01 25a Kataluna E-Renkontiĝo, Sabadell, Hispanio (KEA, pk 32.318, Barcelona 2)

ATENTIGO: Ni planas aperigi kompletigon de ĉi tiu kalendaro en la oktobra aŭ novembra revu-numero ĉi-jare. Zorgu, ke la detaloj pri viaj aranĝoj atingu nin ĝustatempe. Dankon!

Montri la aplikadon

Esperanto in the Modern World / Esperanto en la moderna mondo; Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj, la rajto je komunikado kaj la internacia lingvo (1959-1982). Kompilis R. kaj V.S. Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1982 (dua eldono). 600 p. 21 cm. ISBN 0 919186 18 1. Dulingva eldono en la angla kaj Esperanto. Bindita. Prezo: 66,00 gld.

Informante pri Esperanto, ni ofte forgesas, ke ĝi estas funkcia lingvo, jam vaste aplikata. Ĝi iagrade ja "venkis". Tamen, ni ne enrigardigas neesperantistojn en la Movadon kaj la praktikan aplikadon de la lingvo, tiel ke ili ofte ne kredas niajn asertojn.

Por ŝanĝi tion, gesinjoroj Eichholz kompilis la dulingvan libron *Esperanto en la moderna mondo Esperanto in the Modern World*. Laŭ la eldonintoj, la libro, kiu arigas artikolojn el elstaraj esperantlingvaj gazetoj aŭ — precipe — el *Esperanto-dokumentoj*, havas tri celojn: montri la evoluon de la monda lingvoproblemo, enkonduki en la Internacian Lingvon kaj montri ĝian diverskaman aplikadon per dulingvaj specimenaj artikoloj.

Konforme al tiuj celoj strukturiĝas la libro: Komence, — post represo de la fama informilo *Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo* — sekvas mallonga prezento de Esperanto, inkluzive de vortareto kaj la "dek ses reguloj". Malgraŭ la asertoj en la antaŭparolo, ne eblas kompreni la relative malfacilajn tekstojn de la libro post kelkhora studado de tiuj paĝoj, precipe kiam temas pri tekstoj netradukitaj al la angla (ekz. "Oficala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo", unu el la plej interesaj artikoloj en la libro). Tiu unua parto enhavas eble iom tro detalajn informojn pri Zamenhof kaj la ekesto de la lingvo.

Tre sukcesa ŝajnas la meza sekcio de la libro, kiu traktas la mondan lingvoproblemon; sed estus pli logike, se tiu parto troviĝus unualoke, eĉ en informa libro, kiun oni ĉiukaze legas trafoliume, elektante el la abundo. Tiu malgranda antologio de artikoloj el *Esperanto-dokumentoj* estas interesa ankaŭ por esperantisto, kiu ankoraŭ ne tro konatiĝis kun la eldonaĵoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED).

La lasta parto, kulmino de la libro, donas ampleksan panoramon de la aplikado de Esperanto. La leganto ekhavas superrigardon pri vortaroj, literaturo kaj gazetoj en la Internacia Lingvo (ankaŭ pri filatelaĵoj, institucioj, radioelsendoj ktp), des pli ke la kompilintoj ne nur listigis la materialon, sed aranĝis buntan mozaikon el artikoloj, eltondaĵoj kaj ilus-

traĵoj. Tiu cetere tre aktuala kompilaĵo postlasas vivan impreson. Bedaŭrinde, multaj tre altnivelaj artikoloj estas nek tradukitaj nek anglalingve resumitaj.

En tiu parto de la libro fotorepreso de la originalaj artikoloj aŭ eltondaĵoj ja estas dezirinda, sed — malfeliĉe — tiu tekniko karakterizas la tutan libron. Tiel, la daŭra ŝanĝiĝo de litertipoj, margenoj, kompostmanieroj tra 600 paĝoj estas ĝena kaj ŝajnigas la libron subnivela. La impona ekstera aspekto kaj la luksa bindaĵo parte kompensas tiun perdon.

Malgraŭ siaj mankoj, tiu ĉi interesa novstila informlibro pri la Internacia Lingvo kaj ĝia aplikado estas unu el tiuj verkoj, kiuj devas troviĝi en ĉiu publika biblioteko en angla-lingvaj landoj. Ĝi povus esti pliriĉigo ankaŭ por la librobreto de esperantisto, al kiu ĝi liveras interesan materialon por la informlaboro.

Martin Haase (FR Germanio)

Kvar atentindaj etaĵoj

Tondaĵoj / Knipsels / Wycinanki, de Wouter F. Pilger (1942). Lelystad: Vulpo-Libro, 1978. 26 p. Ilus. 21 cm. ISBN 90 70074 09 5. Trilingva (Esperanta, nederlanda, pola). Prezo: 4,20 gld.

Ne ĉiam, de W.F. Pilger. Vulpo-Libro, 1974. 15 p. Ilus. 15 cm. Prezo: 1,80 guldenoj.

En frua majmateno; Kelkaj perloj el la mezepoka nederlanda poezio. Trad. W.F. Pilger. Vulpo-Libro, 1977 (2a reviziita eldono). 16 p. Ilus. 15 cm. Prezo: 1,80 gld.

Soife mortas mi; Kvar baladoj, de François Villon (1431-1464?). El la franca trad. F. Gauthier (pseŭd.). Vulpo-Libro, 1977. 15 p. Ilus. 15 cm. Prezo: 1,80 gld.

Vidu, kion kaŭzis la vakuo lasita de *Norda prismo* kaj nur en 1980 plenigita de *Fonto*, nome la manko de bona literatura revuo. Se tia ekzistus, kiam aperis ĉi tiuj kelkpaĝaj broŝuretoj, 15 × 10 cm (nur unu atingas normalajn dimensiojn), ĝi certe kontentigus la bezonon de la aŭtoroj, vidi siajn verkaĵojn presitaj en deca formato. Ĉar ĉi tiu estas tre maloportuna por librobreto, kie ili pro la enhavo ja meritas stari.

Trilingvismo okazas ofte ĉe denaskaj esperantistoj, kiam la patrino loĝas en la hejmlando, por ŝi fremdlando, de la patro. Tute nature ŝi instruas al la infano sian lingvon; inter si, kun aŭ sen ĝia ĉeesto, la gepatroj parolas la internacian; kun geamikoj kaj en la lernejo ĝi lernas la lingvon de la patro. Ŝajne do pro sia trilingva filino Wouter Pilger verkis *Tondaĵoj*. Tial la poemetoj kaj la ilustraĵoj (papertondaĵoj) celas infanon.

Ne ĉiam propre ne estas poemaĵoj, kiel diras la titolo, sed nuraj miniaturoj, pensraketoj, ĉi-foje por plenkreskuloj, ĝenerale milde ironiaj.

En frua majmateno, tradukoj el nederlanda mezepoka poezio, respegulas la eŭropan poezion de la epoko, kiu estis jen didaktika, jen religia, jen priama. Ĉi-lastaj tamen neniam atingas la nivelon de la veraj trobadoroj. Notindas la peno de la tradukinto, en "Ekstaze", redoni sinsekve kvar rimojn (eĉ se kelkajn abortajn), sen rompi la sencon.

En la traduko de Gauthier tuj rekoneblas la granda Villon, kies kvar baladojn inspiris lia propra risiko- kaj suferoplena vivo, pri kio, laŭkonfese, nur li mem kulpas. Sufiĉe multe konserviĝis de Villon, por pravigi eldonon de pli ampleksa volumo de liaj verkoj.

L.H. Knoedt (Brazilo)

Laŭdinda provo

Internacia kemio-vortaro Esperanta-angla-germana, de Manfred Westermayer (1947). Tübingen: La aŭtoro, 1981. 71 p. 21 cm. Mimeo. Prezo: 12,60 gld.

International Chemical Dictionary (angla-Esperanta-germana), de M. Westermayer. Tübingen, La aŭtoro, 1982 (2a eldono). 75 p. 21 cm. Prezo: 15,60 gld.

Internationales Chemie-Wörterbuch (germana-Esperanta-angla), de M. Westermayer. Tübingen, La aŭtoro, 1982 (2a eldono). 75 p. 21 cm. Prezo: 10,20 gld.

Jam en la antaŭparolo oni bedaŭrinde konstatas, ke la akuzativa -n ankoraŭ kelkfoje donas malfacilaĵojn. La cetera parto havas, krom enkondukon, vortliston kun ĉ. 4 500 terminoj. Trastudo montras, ke enestas ankoraŭ multaj ĉiaspecaj malglataĵoj, mankoj ktp. Sur kvin arbitre elektitaj paĝoj (de po ĉ. 60 terminoj) la recenzanto trovis po minimume kvin korektindaĵoj. Jen ekstrema ekzemplo:

Angla: *laquer*, *varnish*, *boiled oil* (*laquer* devas esti *lacquer*; tiu korekta termino cetere troviĝas ankaŭ en la vortlisto);

Esperanta: *lako*, *verniso*;

Germana: *Fernis*.

Tio estas ses terminoj, el kiuj **nur du** estas tute samsignifaj (A *varnish* = E *verniso*; G devas esti *Klarlack*). La aliaj vortoj do reprezentas malsamajn materialojn (notu tamen, ke nepigmentitaj lakoj apartenas al la vernisoj).

Kurioze estas, ke en la volumo EAG la vorto *verniso* mankas; *lako* enestas sed havas la neĝustajn tradukojn A *varnish*, G *Fernis*, *Anstreichmittel*.

Tiaj malglataĵoj signifas, ke la uzanto de la vortaro fakte devus esti fakulo kaj prefere devus iom scii la aliajn lingvojn.

La Esperantaj terminoj (volumo EAG) faras grandparte fidindan impreson.

Resumante oni povas diri, ke la libroj estas laŭdinda provo atentigi pri ankoraŭ limigita Esperanta

kemia terminaro, sed ke ĉefe la libroj AEG kaj GEA nepre bezonas korektadon. Tio tamen estas tempo-raba laboro, kiu postulas kunlaboron de pluraj fakuloj.

W.J. Nijveld (Nederlando)

Meritplena kompila laboro

Bibliografio de vortaroj / A bibliography of Esperanto Dictionaries, de Edward Ockey. Banstead (Britio): Mondlingvaj Libro, 1982. 11 + 238 p. 29 cm. Bindita. Prezo: 93,00 gld.

Por ĉi tiu libro la aŭtoro faris tre meritan kompilan laboron. Mirigas iom la fakto, ke Ockey eldonis la verkon tiel koste (bindite, kun orlittera titolo!), ĉar — laŭ la enkonduko — la libro estas nur provizora malneto.

Eraroj en la ĝenerala plano de la libro estas tamen kelkaj: Ofte mankas la indiko pri la nombro de vortoj aŭ vorteroj en vortaroj, kiun oni, havante la verkojn enmane, estus povinta mem kalkuli. Forestas traduko de librotitoloj, pri kio la aŭtoro estus povinta demandi al esperantistoj el la koncernaj landoj. Simile estas pri la landoj en kiuj situas la eldonejoj: kie situas, ekzemple, Jablonné nad Orlicí, Ane Prážak (p. 5)? Supozeble, temas ĉi tie pri Ĉeĥoslovakio. Krome, novaj paĝoj ofte komenciĝas nepravigite per la enhava divido de la teksto.

Mi ne havis tempon esplori ĉiujn fontojn, kiujn Ockey uzis en la kompila laboro, por tiel testi la kompletecon de la bibliografio. Mi komparis la verkon kun la plej facile konsultebla informilo — la lasta librokatalogo de UEA (aperinta en 1980). Tie mi trovis kvin vortarojn, kiuj mankas en la bibliografio de Ockey: *Esperanto-Elinikón leksikon* (aperis en 1971) de S. Sakellaropoulos; *Turista vortaro portugala-Esperanta / Esperanta-portugala* (1974) de Polonius kaj A. de Maura; *Supplement till Svensk-Esperantisk Ordbok* (1975) de E. Vilborg; *Esperanto Lingvo Internacia* (1974) de L. Turno kaj H. Mašler; *Eszperantó nyelvkönyv* (1965) de I. Szerdahelyi. Stranga estas la enmeto de *Kudra kaj trika terminaro* en la rubrikon "Scienco kaj teknologio" (p. 15).

Malgraŭ tiuj kaj kelkaj aliaj malpli gravaj mankoj, la verko de Ockey estas tre valora konsultlibro, kaj mi esperas, ke ĝi en sia definitiva eldono, post korektoj kaj kompletigoj, iĝos ankoraŭ pli valora.

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

Klara kaj tuj utila

Margene de la lernolibro, de Bernard Golden (1925). Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 58 p. 20 cm. ISBN 963 571 083 6. Prezo: 6,60 gld.

Ĉar apenaŭ troviĝas konstato aŭ aserto en ĉi tiu verko, pri kiu mi emas malkonsenti, kaj ĉar la verko

uzas klaran stilon por esti utila al la komencintoj, mi havas nur la agrablan devon rekomendi ĉi tiun libron al viaj bretoj kaj lernogrupeoj. Ĝia titolo klare anoncas ĝian karakteron. Temas pri kolekto da laŭokazaj lingvaj notoj. Multo estas specife direktita al hungara publiko. La lasta ero, "La uzo de la angla lingvo en Esperanto", eble vekos diskuton en la kadro de la aktuala recerbumado pri la rilato de Esperanto al aliaj multlandaj lingvoj. "Homo, kiu lernas fremdan lingvon[,] volas uzi ĝin por parade montri sian ofte nur supraĵan lingvoscion. Ŝajnas, ke hodiaŭ la angla lingvo, estante ĉe la apogeo de sia sukceso, nutras la kulturan kaj edukan superecon de tiuj snoboj" (56). Devus veki diskuton ankaŭ la dua kolektero, "Prepoziciaj problemoj; 'sur' aŭ 'en'?" Ĝi uzas *PIV* kaj *PG* kiel ĵuĝilojn, kiel la plimulto de la artikoloj. Iuj legantoj eble demandos sin, ĉu la uzo de ĉi tiuj prepozicioj iugrade ŝanĝiĝis post la tempo, kiun observis kaj registris Kalocsay kaj Waringhien. Respondi la demandon povos nur tiaj diligentuloj, kiel Golden, per fosado tra la gazetoj, libroj, sonreproduktoj kaj libere aŭskultataj babiloj en nia lingvo.

Probal Daŝgupto (Hinda Unio)

Instrui estas krea arto

Metodiko en la praktiko. Red. Zs. Barcsay. Budapest/Paderborn: Hungara Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Centro Paderborn, 1982. 122 p. 21 cm. ISBN 3 922570 34 8. Prezo: 14,70 gld.

La celo de la libro, laŭ la antaŭparolo de la redaktintino, estas "doni ideojn kaj montri jam iritajn vojojn". Tio signifas, ke la libro celas helpi al la instruistoj kaj kursgvidantoj de Esperanto per praktikaj sugestoj kaj per modelaj ekzemploj. Ĝia unua parto (p. 9-42) estas kolekto de teoriaj eseetoj pri ĝenerala didaktiko laŭ diversaj — metodikaj, lingvistikaj kaj psikologiaj — aspektoj. La aŭtoroj estas Ragnarsson, Bormann, Szerdahelyi, Barcsay kaj Dahlenburg. La dua parto (p. 43-95) enhavas prezentojn de la plej diversaj metodoj, ilustritajn per detala priskribo de lecionoj. La gamo ampleksas instruhorojn por plenkreskuloj, studentoj, gimnazianoj kaj bazlernejoj. La aŭtoroj estas Dahlenburg, Childs-Mee, Dimov, Ludwig, Piron, Terts, Horváth, Csíszár, Bodnár kaj Formaggio-Vilisics.

La libro ne elĉerpas sian objekton. Neniu dubo pri tio. Tion ĝi ankaŭ ne povus, eĉ se ĝi intencus. Instrumetodoj estas sennombraj. Laste, ĉiu instruanto havas la sian. Instrui ja estas krea arto, kaj bona instruho estas okazanta artaĵo laŭ tute persona stilo. Jen sin prezentas la dua, ne tiel facile videbla, celo de la libro: instigi la spertulojn pri instruado kompletigi la ĝisnunan kolekton per pliaj kontribuadoj, por ke la libro fariĝu ankoraŭ pli valora, pli multfaceta. Ĝis tiam la Esperanto-instruistoj ĝoju, ke ekzistas alme-

naŭ ĉi tiu libro, kiu por ili estas ne plu malhavebla. Lerni devas ne nur la lernantoj, tion devas ankaŭ la lernigantoj. Kaj tion ili faros des pli volonte, ju pli saĝaj ili estas. Al ĉiuj ja minacas la danĝero de rutinigo, de ŝablono.

La tria, suplementa, parto de la libro enhavas liston pri la eblecoj sin submeti al Esperanto-ekzameno (Bormann), bibliografion, koncizajn indikojn pri la 17 aŭtoroj kaj fine, aparte valoran 14-paĝan laŭlandan resumon pri la "oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo". Ĝin iniciatis kaj kompilis, certe diligente kaj fervore laborante, Germain Pirlot. La antaŭparolon por ĝi verkis Michel Duc Goninaz. La libro estas belaspekta, presita tre klare. Servu vin!

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)



Aktualnye problemy sovremennoj interlingvistiki; Interlinguistica Tartuensis I (Aktualaj problemoj de la nuntempa interlingvistiko). Diversaj aŭtoroj. Red. A.D. Duliĉenko. Tartu: Universitato, 1982. 200p. 21cm. Plurlingva artikolaro (ankaŭ pri Esperantaj temoj), kun pluraj resumo en Esperanto. Prezo: 15,00 gld.

Almanako Lorenz 1983. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1983. 209p. Ilus. 21cm. 65 diversspecaj kaj diversaŭtoraj kontribuadoj, prozaj kaj foje versaj, plejparte spiritismaj. Prezo: 9,90 gld.

Analizo de la interrilatoj inter la blindularo kaj la diversaj socioj de la eŭropaj industriigitaj landoj. José Starck. Sen eldonindikoj (Antverpeno: La aŭtoro 1982, 2a eldono). 167p. 21cm. Sociologia studo por licencio en la Universitato de Bruselo. Prezo: 24,00 gld.

Bahaaj respondoj. El la hispana trad. P. Amorim Cardoso. Fortaleza: Bahaa Esperanto-Ligo, 1977. 30p. 22cm. Prezo: 4,80 gld.

Bakŝiŝ; Skizoj el la vivo de egiptoj; Novelaro (1938), Leonard N. Newell (1902-1968). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983 (represo). 153p. 19cm. Dek originalaj noveloj, verkitaj en simpla kaj eleganta stilo, laŭ realisma skolo. Kun postparolo de H. Vatré. Prezo: 24,60 gld.

Batalo de l' vivo, La, Charles Dickens (1812-1870). Tradukis el germana traduko L.L. Zamenhof. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982 (4a eldono). 93p. 20cm. Pionira Esperanta traduko, unue aperinta en 1891 en *La esperantisto*. Kun postparolo de R. Haupenthal.

Baza literaturo krestomatia (1979). Red. Vilmos Benczik (1945). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982 (2a eldono). 281p. 18cm. ISBN 963 571 095 X. Originalaj verkoj de 59 Esperantaj verkistoj, kronologie aranĝitaj, kun biografiaj notoj pri la aŭtoroj. Prezo: 13,80 gld.

Ĉina-Esperanta vortaro. Kompilis Pekina E-Asocio. Beijing: Scioj, 1982. 384p. 13cm. Poŝformata vortaro kun 14 000 vortoj kaj 5 aldonoj (kronologia tabelo pri la ĉina historio, geografiaj nomoj, kemiaj elementoj, ĉinaj naciecoj, tabelo de la korelativoj). Prezo: 15,00 gld.

Ĉu militista nacidefendo estas kredebla? Jean Lasserre. El la franca trad. R. Laval. Laroque Rimbaut: Cercle espérantiste, 1983. 34p. 21cm. Mimeo. Prezo: 2,40 gld.

Defendi la pacon, preventi nuklean militon; Proponoj de Soveta Unio en la Dua Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado. Red. D. Perevalov kaj V.S. Aroloviĉ. Moskvo: APN, 1982. 75p. 17cm. Prezo: 3,00 gld.

Dek kvin komedietoj (1974), Robert Mackey. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1983 (2a eldono). 82p. 21cm. ISBN 0 905149 20 3. Facile prezenteblaj komedietoj por kursoj kaj klubvesperoj. Prezo: 7,20 gld.

Du bulgaroj kantas en Esperanto. Gramofondisko, stereofonia. Sofia: Balkanton, 1982 (neindikite). 30cm. 33t/m. BOA 10972. Kantas Maria Angelova (soprano) kaj Dimitro Denĉev (tenoro). Dek sep famaj arioj kaj kantoj en la plenumo de du belaj voĉoj de operkantistoj. Fortepiana akompano de Sneĵana Barova. Prezo: 18,00 gld.

Educational value of Esperanto study, The, B. Sherwood. Bailieboro: Esperanto Press, 1982. 8p. 21cm. Prezo: 0,60 gld.

Een nieuwe methode voor het leren van de internationale taal Esperanto, Henk Thien (1911). Amsterdam: La aŭtoro, 1983 (neindikite). 355p. ilus. 21cm. Mimeo. Riĉe ilustrita lernolibro por nederlandlingvanoj, kun tre granda atento al la elparolo kaj fonetiko. Multaj ekzercoj. Prezo: 15,00 gld.

Eksterteranoj forkondukis min sur sian planedon, La, Claude Vorilhon "Rael". El la franca trad. J.-P. Raimbault. Rennes: La tradukinto, 1982. 136p. 21cm. Prezo: 22,20 gld.

Elektro de tekstoj (1867-1873), M. Bakunin (1814-1876). Esperantigis D.C. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste, 1983. 58p. 21cm. Politikaj eseoj de la fama anarkisto. Prezo: 4,80 gld.

Esperanto and The International Year of Disabled Persons. Rotterdam: UEA, 1983. 8p. 21cm. Esperanto Documents 30A. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto aŭtodidakte; Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo, Audrey Childs-Mee (1926). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1983. 194+40p. Ilus. de S. Marković. 21cm. ISBN 90 6336 029 0. Rektmetoda lernolibro verkita precipe por la bezonoj de aŭtodidaktaj lernantoj, sed taŭga ankaŭ por kursoj. Kun ŝlosilo por la ekzercoj kaj kun indeksoj. Prezo: 24,00 gld.

Flandra kaj nederlanda Esperanto-bibliografio, Guido Thys. Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 1983. 91p. 21cm. Mimeo. Alfabeto ordigita katalogo (516 eroj) de eldonaĵoj en kaj pri Esperanto sur la nederlandlingva teritorio. Prezo: 8,70 gld.




Názvosloví kožešnických strojů, zařízení a náradí (Terminaro de peltindustriaj maŝinoj, ekipaĵoj kaj ilaro). Praha: UNM, 1980. 51p. 21cm. ON 79 8001 (MDT 675.6.05). Terminaro 8-lingva (ĉeĥa, slovaka, rusa, angla, germana, franca, hispana, Esperanto). Prezo: 4,50 gld.

Panaceo, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1982 (neindikite). 102p. 17cm. Mimeo. Centro da notoj, kiuj "rilatas al la homa konduto kaj celas montri la kernon de la aferoj". Prezo: 7,20 gld.

Pokalo da poemoj. Kompilis R. Rossetti kaj R. Thyer. Sen eldonindikoj (Luton: La kompilintoj, 1982). 16p. 26cm. Mimeo. Kvardeko da E-poe-moj, originalaj kaj tradukaj, aranĝitaj teme, destinitaj por deklamado. Prezo: 3,00 gld.

Problemy miedzynarodowej komunikacji jezykowej / Problemoj de internacia lingva komunikado. Red. T. Ejsmont. Łódź: Uniwersytet Łódzki, 1982. 286p. 24cm. Mimeo. Konferenca materialo de dudeko da aŭtoroj, pollingve, kun ampleksaj resumoj en Esperanto. Prezo: 21,00 gld.

Programlingvo "Pascal", La, Christian Bertin (1949). Rennes: La aŭtoro, 1982. 72p. 30cm. Mimeo. Prezento de la komputila programlingvo, kun kelkaj ekzemplaj programoj verkitaj en ĝi. Prezo: 9,90 gld.



Frandu piron, Johán Valano (pseŭd.). Ĝenevo: LF-koop, 1982. Stereofonia kaseto duflanka, 34-minuta, kun tekstofolio. Valano interpretas 13 kantojn, inter kiuj troviĝas malnovaj popolmelodioj (rusaj, anglaj, franca, bolivia) kaj kelkaj originalaĵoj. Instrumenta akompano de Gianfranco Molle k.a. Prezo: 30,00 gld.

Frekvencmorfemaro de parolata Esperanto, Zlatko Tišljar. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1981 (?). 41p. 21cm. Komputila esploro pri 1343 morfemoj. Prezo: 6,00 gld.

Historio de la Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", M. Jaumotte, H. Sielens, J. Verstraeten k.a. Antverpeno: La Verda Stelo, 1932, 1957, 1982. 32+31+28p. Ilus. 24cm. Tri apartaj broŝuroj, kiuj traktas la vivon de la loka grupo en la periodo 1907-1982. Prezo (de ĉiuj tri kajeroj): 8,70 gld.

Katoj kaj ĉevaloj, Adalberto Huleš (1926). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 80p. 20cm. ISBN 963 571 100 X. Originalaj poemoj, lirikaj. Prezo: 12,00 gld.

Kion scii por organizi nian movadon; Diskutmaterialo. Budapeŝto: Hungara E-Asocio, 1982. 29p. 21cm. ISBN 963 571 046 1. Enhavas la eseon "Pri la 'interna ideo' de Esperanto" de D. Bnake. Prezo: 3,00 gld.

Krestomatio de Esperanta literaturo; Tekstoj, dataro, bibliografio; Vol. III, István Szerdahelyi (1924). Budapeŝto: Tankönyvkiadó, 1982. 476p. Ilus. 24cm. La verko traktas la komencajn periodojn de la E-literaturo en Britio, Francio, Svislando, hispanio, Portugalio, Norda kaj Suda Amerikoj, Afriko, Azio, Oceanio. Prezo: 18,00 gld.

Lanternisto kaj aliaj noveloj, La. Div. aŭtoroj. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982. 162p. 19cm. Paralela eldono en Esperanto kaj la ĉina. Brazilo (Arinos), pola (Sienkiewicz), svisa (Escherich) kaj du bengalaj (Tagor) rakontoj. Prezo: 8,40 gld.

Lukto kontraŭ la analfabeteco en Vjetnamio. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 45p. 22cm. Prezo: 4,20 gld.

Manlibro pri ĵurnalismo, Judith Junger kaj Stefan Maul. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 80p. Ilus. 21cm. ISBN 90 6336 015 0. Pri diversaj teoriaj kaj praktikaj aspektoj de la ĵurnalista laboro, kun terminaro. Prezo: 13,80 gld.

Rozo de l' sultano, La, Gyula Krúdy. El la hungara trad. István Nagy. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 54p. Ilus. de L. Kertész. 19cm. ISBN 963 571 042 9. Riĉe ilustrita fabelo pri la tempoj, kiam Hungario estis sub la turka regado (16a kaj 17a jarcentoj). Prezo: 9,90 gld.

Sagaoj kaj Zamenhof: Stabiligaj faktoroj, La, Baldur Ragnarsson (1930). Nagoya: Eldona Societo de NEC, 1982. Kaseto 41-minuta kaj tekstolibro (8+12p. 21cm). Pri stabiligaj faktoroj en malgrandaj lingvoj (komparo inter Esperanto kaj la islanda). Prezo: 19,80 gld.

Seksa humoro; Antologio de ilustritaj humoraĵoj. Kompilis H. Candi. Las Palmas: La kompilinto, 1982. 40p. Ilus. 22cm. Mimeo. Prezo: 3,60 gld.

Siberio en neĝo, Denzi Kurosima (1898-1943). El la japana trad. M. Miyamoto (1913). Kioto: L' Omnibuso, 1982. 88p. Ilus. 18cm. Tri rakontoj de japana kontraŭmilitisma verkisto. Prezo: 17,10 gld.

Stoikismo, La, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 18p. 21cm. Mimeo. Prezo: 1,20 gld.

Svedaj arboj kaj arbedoj; Propono al vortaro sveda-Esperanta-latina, Esperanta-sveda-latina, Malte Markheden. Sjö Haga: La aŭtoro, 1982. 31p. 21cm. Mimeo. Prezo: 4,20 gld.

Unu aŭ nul; La mondo aŭ estos tutmondista aŭ ne plu estos, Guy Marchand (1919). El la franca trad. Heredanto. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste, 1983. 103p. 21cm. Prezo: 7,20 gld.

Virineto en bluo kaj aliaj rakontoj, La (1946), Mason Stuttard. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983 (represo). 150p. 18cm. Dek tri rakontoj originale verkitaj en Esperanto. Prezo: 24,00 gld.

Vita esperantista de Genova, Liguria e Lunigiana dal 1900 al 1978, G.B. Briano (1902-1978). Liguria: Edizioni Sabatelli, 1979 (neindikite). 157p. Ilus. 24cm. Prezo: 24,00 gld.

Vjetnamio: Kiaj homaj rajtoj? Esperantigis Minh Kinh. Hanojo: Vjetnama Kuriero kaj VPEA, 1981. 145p. 17cm. Prezo: 4,20 gld.

Wundersame Leben des armen Doktor Lazarus, Das, Richard Schulz (1906). Stuttgart: CJZ, 1982 (neindikite). 30p. 21cm. Mimeo. Skizo pri la vivo de Zamenhof. Prezo: 3,00 gld.


Refondiĝo en Svislando

Antaŭ du jaroj ni en ĉi tiu rubriko prinotis malfondiĝon de Svisa Esperanto-Junularo (SEJ). Ŝajnis tiam, ke tiu landa sekcio de TEJO ĉesis funkcii pro administraj, kaj ne pro financaj aŭ homfortaj problemoj. Ni memoris, ke kelkajn jarojn pli frue (en 1977) SEJ estis tiel vigla, ke ĝi havis propran teatran trupon ("Vagabondoj"), dum du lokaj grupoj — en Lucerno kaj Zuriko — eldonis siajn proprajn revuetojn. Zuriko intertempe silentiĝis, Lucerno ne tute. Nun aŭdiĝas tiu nova ĉefurbo de la svisa Esperantomovado — La Chaux-de-Fonds.

En januaro kaj februaro ĉi-jare, en Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds) dufoje rekontiĝis iniciata grupo por refondi la junularan sekcion en Svislando. En la kunsido de la 19a de februaro efektive fondiĝis Junularo Esperantista Svislanda (JES). La fondiĝo de JES restas tamen neoficiala ĝis la asembleo de ĉiuj svisaj movadaj gejunuloj, kiu okazos la 11an kaj 12an de junio en La Chaux-de-Fonds. Tiu kunveno supozeble ratifos la (re)fondiĝon de JES, por kiu la iniciata grupo ellaboris ankaŭ la statutproponon.

Intertempe JES planas plian kunsidon de la iniciata grupo meze de aprilo kaj ferian aranĝon por biciklantoj de la 9a ĝis la 15a de oktobro ĉi-jare, ambaŭ en La Chaux-de-Fonds. Ankaŭ la kontaktadreso de la nova organizaĵo estas tie: JES, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Juna hungara paro rajdas tra la vastoj de sia lando: Kiel jam plurloke prinotite (vidu ankaŭ en nia kalendaro, p. 50), multaj partoprenantoj de la ĉi-jara TEJO-kongreso planas rajdi biciklojn el diversaj partoj de Eŭropo, kun la celo atingi Debrecen antaŭ la fino de la IJK. Ni ne tre surpriziĝu, se kelkaj el ili decidus rajdi ĉevalojn survoje el Debrecen al siaj hejmoj.



Debrecen — la urbo de la 39a IJK

Debrecen kun sia kvaron-miliono da loĝantoj estas la tria inter la plej grandaj urboj de Hungario. Ĉar la urbo estas grava trafika vojkruĉiĝo, ĝi estas tre facile atingebla per aŭtomobilo aŭ trajno. Debrecen situas 220km oriente de Budapeŝto.

Al la nomo de la urbo, kiu ĉi-jare gastigos la TEJO-kongreson, ligiĝas pluraj gravaj eventoj el la hungara historio, precipe tiuj ligitaj al la disvastiĝo de la protestantismo, pro kio Debrecen akiris la kromnomon "la kalvinista Romo". Ankaŭ la proklamo de la hungara sendependeco ligiĝas al Debrecen, en kiu kelkfoje troviĝis la sidejo de la hungara registaro. Pro ĉio ĉi, multe da vidindaĵoj proponas sin al la vizitantoj de Debrecen kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Alia kromnomo de Debrecen — la banejurbo — aludas la ekziston de multaj varmaj fontoj en la regiono.

La urbo estas unu el la plej grandaj edukaj centroj en Hungario. Ĝia Reformacia Kolegio fondiĝis en 1538, kaj la urbo nun havas tri universitatojn, 4 altlernejajn institutojn, multajn mezajn kaj bazajn lernejojn kaj aliajn edukajn instituciojn.

En la ĉirkaŭaĵo de Debrecen troviĝas la stepo Hortobágy, kiun oni konsideras la plej granda nacia parko en Eŭropo. La programo de la 39a IJK antaŭvidas ekskursojn al tiu unika natura rezervejo.

VLADIMIR BAKARIĆ (1912-1983), vicprezidanto de Jugoslavio, forpasis meze de januaro en Zagrebo. D-ro Bakarić estis la Alta Protektanto de la 38a Universala Kongreso en 1953, kiun li alparolis en Esperanto. Kiel tion ankaŭ nun prinotis la ĉefa kroata ĵurnalo *Vjesnik* (n-ro de la 19a de januaro), en ampleksa artikolo kun foto, Bakarić lernis Esperanton en siaj gimnaziaj jaroj.

CHARLES BARDSLEY (1901-1982), kiu membris en UEA dum kvindekda jaroj kaj estis delegito kaj fakdelegito, mortis la 24an de decembro en Oldham, Britio.

ANDRÉ BLONDEAUX (1913-1982), antaŭa delegito kaj multjara membro de UEA, mortis la 22an de decembro en Loctudy, Francio. Li estis eminenta fakulo pri fervoja terminologio kaj en 1978 aperis lia *Fervoja leksikono franca-Esperanta*.

HECTOR BOFFEJON-FEHR (1902-1983), malnova belga esperantisto, antaŭa direktoro de aŭtomobilkompanio, mortis la 14an de januaro en Sempach (Svislando). Boffejon faris multan laboron sur la kampo de la aŭtomobilista Esperanto-terminologio.

GUY BRACQUEMOND (1925-1982), profesoro pri matematiko en Clermont-Ferrand (Francio), forpasis la 25an de decembro. Delegito kaj dumviva membro de UEA, UFE kaj ISAE, li estis ofta partoprenanto de la Kongresoj kaj aktivulo en la matematika sekcio de ISAE.

RENÉ DUBOIS (1886-1983), pioniro de la franca Esperanto-movado, parte preninto de la Unua Kongreso en Bulonjo-sur-Maro, mortis en Parizo la 8an de januaro. Dubois jam en 1906 fondis Esperanto-grupon en sia naskiĝloko kaj du jarojn poste helpis fondi regionan Esperanto-organizaĵon en norda Francio. Li kunlaboris en la kabareto "Verda Kato" de R. Schwartz en Parizo, kie li ankaŭ sekretariis en la loka grupo (1920-1939) kaj kunlaboris en la organizo de la Universalaj Kongresoj en 1914 kaj 1932. Inter la du mondmilitoj Dubois faris multon por reorganizi la internacian Esperanto-movadon: lia konata "Projekto Dubois" (formulita en 1929) kondukis al "Konvencio de Parizo" (1932), kiu siavice nuligis la "Kontrakton de

Helsinki" kaj kondukis al la "Interkonsento de Kolonjo" en 1933. Dubois ne partoprenis aktive la Movadon dum la lastaj jardekoj de sia vivo, sed li neniam ĉesis interesiĝi pri ĝiaj stato kaj progreso.

MASUTOSI KIDOSAKI (1907-1982), eminenta japana esperantisto, forpasis la 9an de oktobro 1982 en Tokio. Kidosaki lernis Esperanton jam en 1925 kaj aŭtoris plurajn Esperanto-lernilojn por japanoj. Du liaj verkoj fariĝis konataj ankaŭ en eksterlando: *Zamenhofa legolibro* (1931) kaj *Konkordanco de "Marta"* (1979).

F. ALVES MATA (1905-1983), precipe konata kiel propagandisto de Esperanto inter brazilaj radioamatoroj, forpasis la 3an de januaro en Maceió-Alagoas (Bra-

zilo). Li lernis Esperanton antaŭ dudeko da jaroj kaj multe aktivis en sia regiono, de kie li kondukis 25-personan studentan danctrupon al la 66a UK en Brazilio.

RAMON MOLERA I PEDRALS (1923-1983), multjara ĉefdelegito de UEA en Hispanio, delegito, fakdelegito kaj dumviva membro de la Asocio, forpasis la 28an de januaro en Moià (Barcelona), Hispanio. Molera estis unu el la iniciatintoj de la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio kaj elstara Esperanto-aktivulo en Katalunio. Li pasie kolektis Esperantajn periodaĵojn kaj librojn — tiucele li fondis kaj redaktis la revueton *Kolektanto* — kaj li postlasas tre riĉan kaj bone ordigitan Esperanto-bibliotekon.

JOŠIKO SCHMID (1929-1982), ĵurnalistino, internacie konata pro sia Esperanta prelegvojaĝo (en 1959-60, sub sia antaŭa familia nomo: Kaĵino), forpasis la 3an de decembro en Hasuda, Japanio, kie ŝi estis delegito de UEA.

Loke

● **Italio:** La monata revuo pri scienco, arto kaj kulturo, *Rivivere*, kiu aperas en Forlì, ekde novembro pasintjare enhavas plurpaĝan rubrikon pri kaj en Esperanto. La rubrikon prizorgas d-ro Luigi Tadolini (via del Pozzo 10, I-47027 Forlì). Oni planas, ke la rubriko poste enhavu ankaŭ kurson de la Internacia Lingvo.

● **Ebura Bordo:** En tiu lando nun okazas verŝajne la plej intensa lernado de Esperanto en Afriko. Aldone al kelkaj aliaj studrondoj kaj pluraj unuopuloj, kiuj lernas la lingvon koresponde, antaŭ kelkaj semajnoj trideko da studentoj en la Universitato de Abidjan komencis lerni Esperanton. La kurson gvidas s-ro Gilles Wallez (06 – B.P. 477, Abidjan 06), kiu bonvenigos lernilojn, precipe franglingvajn kaj internaciajn.

● **Japanio:** La 70a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazos la 6an kaj 7an de aŭgusto ĉi-jare en la Oomoto-Centro en Kameoka, apud Kioto. Ĉar al tiu jubilea aranĝo ligiĝos ankaŭ festo okaze de la 60a datreveno de la enkonduko de Esperanto ĉe Oomoto (vidu nian decembran numeron), la organizantoj deziras logi kiel eble plej multe da eksterlandaj partoprenantoj. Al ĉiuj eksterlandanoj oni proponas ne nur senpagan aliĝon sed

ankaŭ senpagan restadon en la hotelo de la Oomoto-Centro. Skribu al: Oomoto, Kameoka-si, Kioto-hu, 621 Japanio.

● **Madagaskaro:** La pola pastro Jan Sadowski, kiu jam de pli ol unu jaro restadas en Madagaskaro, en januaro ĉi-jare malfermis Esperanto-kurson por 13 malagasaj gejunuloj. La kurso okazas en Marolambo (Tamatave), en la orienta parto de la lando. Adreso: Pastro Jan Sadowski, Mission Catholique – 513, Marolambo, Madagaskaro.

● **Francio:** Kelkaj el la nun permesataj privataj radiostacioj prezentas programojn en kaj pri Esperanto, ĝenerale dulingvajn aŭ Esperanto-kursojn. La elsendoj okazas laŭ modulita frekvenco kaj, krome, kun leĝe limigita potenco, pro kio ili estas aŭdeblaj nur loke. Ni menciuj kelkajn el tiuj stacioj: en **Parizo:** Radio Esperanto/Radio Libertaire — 89.5 MHz, merkrede de 14h00 ĝis 15h00 kaj vendrede de 19h00 ĝis 20h00 (loka tempo); Radio 3 — 98.4 MHz, lunde de 09h30 ĝis 10h00 kaj marde de 19h30 ĝis 20h00; en **Pontoise:** Radio Gingle — 104.3 MHz, ĵaŭde de 18h00 ĝis 18h20; en **Tours:** Radio Transistours — 93.8 MHz, lunde de 19h30 ĝis 20h00. Kelkaj aliaj radiostacioj foje elsendas informojn kaj intervjuojn pri Esperanto.

● **Infanoj:** Samtempe kun la 68a UK en Budapeŝto okazos tie ankaŭ du apartaj aranĝoj por infanoj. La unua el ili estas la 20a Internacia Infana Kongreso en kiu ĉi-jare estas rezervita loko por 60 infanoj, en la aĝo de 6 ĝis 13 jaroj. La kotizo de 135 guldenoj (1 800 forintoj) inkluzivas kompletan prizorgon de la infanoj dum la kongresa semajno. La dua aranĝo estos la Infana Tendaro. Ĝi estas destinita por la geknaboj en la aĝo de 10 ĝis 14 jaroj. Ĝi okazos en granda internacia infana restadejo apud Budapeŝto, kie samtempe ferios ankaŭ centoj da aliaj infanoj. Partoprenkotizo: 75 guldenoj (1 000 forintoj). Pliajn detalojn pri ambaŭ aranĝoj oni trovas en la Dua Bulteno de la 68a UK.

● **Instruistoj:** De la 24a ĝis la 30a de julio, en la kadro de la 21a Somera Esperanto-Universitato en Gyula (Hungario), okazos Pedagogia Seminario de UEA. La celo de la Seminario estas interŝanĝi spertojn pri la metodoj de E-instruado. Ankoraŭ eblas proponi kontribuojn por la programo de la Seminario, pri kiu respondecas s-ino Zs. Barcsay (LKK de la 68a UK, Pf. 193, H-1368 Budapest). Ĉe la sama adreso oni povas peti la aliĝilojn pri kiuj disponas ankaŭ UEA. Dum la 68a UK mem, estas antaŭvidita "Tago de la Lernejo", kiu okupiĝos pri la temo "Esperanto-instruado kiel kontribuo al interkultura informado". Ankaŭ por tiu aranĝo eblas proponi kontribuojn al la adreso de s-ino Barcsay.

● **Jubilea Jaro:** En La Chaux-de-Fonds (Svislando) la 21an de majo ĉi-jare okazos kunsido de la provizora laborgrupo por la Jubilea Jaro 1987. Tiu laborgrupo (T. Bormann, R. Corsetti, H. Frank, I. Lapenna, G. Maertens kaj H. Sonnabend) kreiĝis en majo 1982 en Münster (FR Germanio), kun la celo pretigi la vojon por la fondo de komuna internacia laborkomitato, kiu estus reprezenta por la tuta Esperantomovado. La kunsidon en La Chaux-de-Fonds prizorgas la tiea Kultura Centro Esperantista.

● **Sciencistoj:** En la ĉefurbo de Soveta Unio jam pli ol unu jaron ekzistas Moskva Sciencista Esperanto-Klubo (fondita en decembro 1981). Fine de 1982 la Klubo havis 27 membrojn. Ili ĉiuj

estas fakuloj kun supera klereco (inter ili troviĝas 2 doktoroj de scienco kaj 10 doktoriĝaj kandidatoj). La Klubo ĝis nun organizis 11 sciencajn prelegojn de 8 aŭtoroj. Tiuj prelegoj traktis i.a. jenajn temojn: atomfiziko, ekologio, interlingvistiko, matematiko, geografio kaj futurologio.

● **Tradukistoj:** Ŝajnas, ke multaj homoj okupiĝas pri la tradukado en Esperanton kaj el ĝi en naciajn lingvojn. Al lastatempa enketo pri eblecoj kaj bezonoj, ke la tradukistoj organiziĝu, reagis 72 personoj el 19 landoj. La enketon faris s-ro Z. Czupkaŭo (ul. Północna 10, PL-24-220 Niedzwica Duża, Pollando). Se la verkistoj en Esperanto pasintjare refondis sian fakan organizaĵon, kial tion ne faru ankaŭ la tradukistoj?

● **Varbado:** Mono ne ĉiam estas la ĉefa movada problemo. Tion oni konkludas el la sperto de Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto (NGGE),

kiu en novembro 1981 lanĉis kampanjon kaj ĝis nun kolektis pli ol 7600 guldenojn (de ĉ. 150 unuopuloj kaj deko da Esperanto-grupoj), por nun konstati, ke ne troviĝas aktivuloj por elspezi tiun monon. Temas pri la kampanjo "Esperanto 100", kiu celas varbi novajn lernantojn de la lingvo pere de la konata kurso *Esperanto Programita*. Ĝis nun troviĝis nur kelkdeko da lernantoj, ĉar kunlaboras nur manpleno da aktivuloj. Pliajn detalojn oni petu ĉe la gvidanto de la kampanjo: s-ro Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, 1871 SB Schoorl; telefono: (02209) 1565. Nederlandanoj tien direktu siajn dezirojn kunhelpi en la kampanjo, kiu laŭ sia nomo ligiĝas al la centjara Jubileo, kaj do daŭros ĝis 1987.

● **Radio:** En la 600-paĝa "Monda gvidlibro pri radio- kaj televid-elsendoj" (*World Radio TV Handbook*), kiu aperas anglalingve en Hvidovre (Danlando), ĉi-jare denove aperis dupaĝa prezento de la regulaj radioelsendoj en Esperanto. Jam de kelkaj jaroj tiujn informojn al la dana eldonejo disponigas s-ro Georges Larglantier, redaktoro de nia radiorubriko.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Lernejo en Hinda Unio serĉas instruiston, kiu instruus Esperanton (kiel nedevigan studobjekton) duontage, kaj duontage la anglan. La lernejo ne pagos la vojaĝkostojn, sed senpage loĝigos, manĝigos kaj donos poŝmonon ĝis 250 rupioj monate. Oni skribu (Esperante aŭ angle) al la lernejestro de: Oxford Creativity School, New Postal Colony, Patamata, Vijayawada 520 006, Hinda Unio.

19-jara fraŭlo deziras korespondi kun gejunuloj pri ĉiuj temoj: Soruŝ Mohammad-zadeh, P.O. Kesto 54-297, Tehran 15, Irano.

Pri lingvoj kaj vojaĝoj deziras korespondi kun samaĝuloj 35-jara bulgara tradukisto: Roumen Dimitrov, str. D. Poljanov n-ro 1, BG-1504 Sofia, Bulgario.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Sciencfikcio estas la temo de niaj libroj: *Sferoj*. Ni serĉas pliajn kunlaborantojn. Skribu al: Grupo Nifo, Floranes 57-2º-C, Santander, Hispanio.

Lerni paroli Esperanto-lingve per la sukcesaj *Facilaj dialogoj!* Aŭfrankite: 29 francaj frankoj. Ligue "Pro UNESCO", 24 ave Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

Kunlabori kaj korespondi kun E-klubo kaj grupoj, tutmonde, deziras: Esperanto-Klubo "Ora Pordego", Ab. jaŝ. 979/1, SU-252058 Kiev, Soveta Unio. Bonvenaj estas ankaŭ unuopaj korespondproponoj.

Leteramik(in)ojn ĉiulandajn serĉas 35-jara japano: Jukitoŝi Satoo, Isii 1229-1, Isii-ĉi, Mjozai-gun, Tokuŝima-ken, 779-32 Japanio.

Elena Liria Jiménez, Calle Macco No. 79, Cascorro-Camagüey, Kubo — studentino, kiu serĉas gekorespondantojn.

23-jara polino volonte korespondus internacie: Justyna Kijak, ul. Katowicka 9, PL-42-263 Wrzosowa, Pollando.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrino metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Senpagan restadon en Antverpeno ni ofertas al tiu(j), kiu(j) dum junio prizorgos niajn katon kaj plantojn. Ni estos eksterlande. Ges-roj de Roover, Luchtvaartstr. 28, B-2200 Borgerhout, Belgio; telefono: 03-321 23 06 aŭ 667 57 70.

San-bulteno: La neatendita morto de mia edzino instigis min eldoni bultenon kun konsiloj de mondfamaj sanigistoj kiel vivi pli longe kaj sane. Mi ne celas profiti. Male, mi rezignacias elspezi multon aĉetante novajn librojn kaj abonante san-revuojn krom tiuj kiujn mi jam regule ricevas. Provizora prezo de dek 8-paĝaj numeroj ŝipe senditaj estas dek dolaroj, kaj aere senditaj dek kvin dolaroj. Sendu abonon preslitere al: Sergio Docal, 3200 NE 36 St., Fort Lauderdale, Florida 33308, Usono.

Dommastrino volonte korespondus internacie: Maria Liria Cisneros, Juan Camino No. 100, Cascorro-Camagüey, Kubo.

Ĉiam, konstante, akceptas korespondopropojn kun japanoj: Japana Korespondo-Servo, ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

Instruistino (19-jara) deziras korespondi kun geknaboj diverslandaj: Diana Iskrevna, str. Kiril i Metodij 77a, ap. 27, Stara Zagora, Bulgario.

Mi planas Super-8-filmon. Subtenantoj petu informojn de: Jan Ulrich Hasecke, Palanter Str. 8, D-5000 Köln 41, FR Germanio. Bv. aldoni respondkuponon.

Hinda esperantistino serĉas korespondantojn precipe en Bulgario, Japanio, Nederlando kaj Svedio: s-ino Sandhya



Jain, 132 Jaora Compound, Indore (M.P.), Hinda Unio.

42-jara juristino volas korespondi tutmonde: Krystyna Tacikowska, ul. Odyńca 41 m.60, PL-93-150 Łódź, Pollando.

Irana studentino volus korespondi kun diverslandaj geamikoj: Farshideh Arabshahi, Shahin-shahr 233 St. No.3, Isfahan, Irano.

Studento, 20-jara, deziras korespondi kun "lingvemaj" finnoj pri (preskaŭ) ĉio: Robert Cuperus, Briljantstraat 167, NL-9743 NG Groningen, Nederlando.

Pri respira virusologio, morbila diagnostiko kaj produktado de morbila vakcino deziras korespondi, precipe kun gekolegioj el Japanio, Soveta Unio kaj Usono, d-rino Vida Pavliviĉ-Ružić. **Pri bredado de koturnoj** deziras korespondi s-ro Momčilo-Moša Pavlović. Komuna adreso: Crnotravska 13A, stan 36, YU-11000 Beograd-Banjica, Jugoslavio.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimуме \$100): Aŭstralio: Ilija Grahovac. Finnlando: Liisi Oterma; Tapio Sormunen. FR Germanio: Wilhelm Treude. Hispanio: Pere Saumell i Vila. Japanio: Hideo Sinoda. Usono: Allan C. Boschen; Alberta Seabold Casey; Ella H. Gibson; Lura R. Chapman; Ralph Murphy; Sidney V. Steinberg.

SUBTENANTOJ (minimume \$25): Alĝerio: Marian Dobrzyński. Aŭstralio: K.G. Linton; Sydney Esperanto Society. FR Germanio: Wolfgang Schwanzer. Francio: Maximilien Trenner; Paul Coulot. Kanado: Edward William Woodruff; P. Larose. Svedio: Amy Nilsson; Tore Johansson. Usono: Audrey Janisen; Apollo Wu; Walter W. (Folio) Kim; Gizella Giguere; Scott S. Smith.

AMIKOJ (minimume \$10): Aŭstralio: Robert S.P. Reed. Finnlando: Allan Mehtonen. Hispanio: Pio Moa Banga. Kanado: Alma More; Kirk Crockett. Norvegio: Louise Bøe.

PATRONOJ DE TEJO 1983

Britio: Patricia C. Sinclair. Finnlando: Osmo Buller. Hispanio: Miguel-Angel Altuna Aspiazu; Ramón Diago Marco. Irlando: Christopher Fettes. Japanio: Yosiki Tatumi. Kanado: Normand Fleury. Kanarioj: Maria Pi Maynar.

DONACOJ 1983 (Gld.)

ĝis la 31a de marto

ASOCIA KAPITALO: Karlskoga Esperanto-Societo 3 563,00. Sumo ĉi-jara: 4 940,22.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Usono: R. Orloff Stone 11,60. Sumo ĉi-jara: 941,55.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: F. Morawetz 33,12. Sumo ĉi-jara: 1 504,54.

FONDAĴO TEJO: Usono: C. Peterson 108,02.

ĜENERALA KASO: Finnlando: O. Pajula 19,78; A. Linja 39,56. Nederlando: Ole Hagemann 300,00. Svedio: T. Lundbjörk 60,00. Div. malgrandaj 5,36. Sumo ĉi-jara: 2 303,62
PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J. v.d. Teems 10,00. Sumo ĉi-jara: 30,00 gld.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Helpu nian administradon! Bonvolu ĉiam mencii vian uea-kodon, kiam vi skribas aŭ pagas al la Centra Oficejo.

Oficiala Informilo

ADRESSANĜO EN HISPANIO


Ekde la 1-a de marto ĉi-jare, Hispana Esperanto-Federacio (HEF), aliĝinta landa asocio de UEA, havas novan poŝt-an adreson: HEF, Apartado 119, Valladolid, Hispanio.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: M. Frus. Japanio: Yosiaki Mizuno; Kaoru Simizu. Nederlando: Nora Reinders.

Societo ZAMENHOF 1983

Beigio: E. Ernst; Clara Peeters. Britio: V.B. Atkinson; Wilfred G. Atkinson. FR Germanio: Ruth Paintner-Trumpp. Hispanio: Josep Castelltort i Riba. Japanio: Saburô Yamazoe. Nederlando: B. Kappert. Norvegio: Agnete Anjer; Ludvig Anjer; Tamiko Kaŭakami-Nielsen. Svedio: Nils Olsson; Sten Svenonius; Tore Fors. Usono: Bruce Arne Sherwood. Venezuelo: Antonio Rivero.



Esperanto en radio

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, Pl-00950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz). I.P.

11.00-11.30 Pekino, 41.01m (7315 kHz), 30.42m (9860 kHz). I.P. Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.67 m (11685 kHz), 19.78m (15165 kHz). I.P.

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz). Informoj. Parolado.

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.

22.30-23.00 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz). I.P.

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 48.47m (6155 kHz), 16.91m (17745 kHz). I.P. Aŭstra Radio (ORF), Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT). Mallongigoj: I (informoj), P (parolado), K (kurso).

09.45-09.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz), 30.71m (9770 kHz). Informoj. Parolado.

19.05-19.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radio-vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

22.00-22.15 Rio de Janeiro, 214m (1400 kHz). P. Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6156 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6156 kHz), 31.46m (9535 kHz). Parolado.

MARDE

05.40-06.00 KELI, Sveda Sekcio, 25.35m (11835 kHz). P. (Nur la unuan mardon de ĉiu monato, per ondoj el Kito, Ekvadoro). Radio HCJB, Poŝtkesto 110, S-542 01 Mariestad, Svedio.

21.10-21.30 KELI, Sveda Sekcio, 16.86m (17790 kHz). Kiel ĉi-supre.

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĴAŬDE

05.10-05.25 Vatikano, 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

VENDREDE

16.25-16.30 Pécs, 343m (873 kHz) kaj M.F. 67.1 MHz. Turistaj informoj dum la monatoj junio, julio, aŭgusto. Radio Pécs, Esperanto, Pf 200, H-7601 Pécs, Hungario.

SABATE

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto, C.P. 230, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendojn en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 7315 kaj 9860 kHz al Japanio kaj Koreo; 11685 kaj 15165 kHz al Sudorienta Azio; 7470, 9365 kaj 9965 kHz al Eŭropo; 9860 kaj 11515 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko. **Vieno**: 5945 kHz al Nordokcidenta Ameriko; 17745 kHz al Aŭstralio kaj Sudorienta Azio.

a) el **Berno, KELI-Radio, Pécs, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo**.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj long-distance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro, Sorocaba** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

Ne sufiĉas nur aŭskulti!

Esperantaj radioelsendoj estas (aŭ povus esti) la plej regula kontakto kun la parola lingvo por la plimulto de esperantistoj. Vi ja scias, ke pasintjare okazis 3 623 tiaj elsendoj, kiuj daŭris 1 555 horojn. Tio signifas, ke oni ĉiutage povas aŭskulti Esperanton per radio dum pli ol kvar horoj. Provu foje! Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konsciu ankaŭ, ke tiuj elsendoj dependas de sia populareco ĉe la aŭskultantoj. Pro tio:

Skribu foje al radio-stacio!

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

Ne pruntedonu MONATOn al viaj geamikoj — abonigu ilin!

Ramón Molera

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



La Libroservo de UEA

disponas pri kelkdeko da ekzempleroj de la baza bibliotekista manlibro

KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ

de M.C. Butler

La 144-paĝa verko aperis en 1950 kaj delonge ne plu estis akirebla en la merkato.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 31,20) gld., plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

LA KANCERKLINIKO, kultura, politika, skandalema, ajnista revuo. Direktoroj: LE PUIL/SEPTJE. Presisto: H. ELIK. 4 n-roj jare. La gazeto, kiu ĉiunumere perdas plej grandan nombron da ambonantoj! Ankaŭ vi rajtos malaboni — sed antaŭe abonu tuj: 50 FF. Pĉk 12 729 73 X PARIS, je la nomo de LE PUIL. Aŭ ĉe UEA: KLIK-g. Provekz. 3 IRK.

SOMERO en GRESILLON

2a-22a de JULIO * **PRELEGOJ**
“la komunikado”

22a-25a de JULIO * **DUALOARA RENDEVUO**
organizita de l. f. koop

25a de JULIO —
2a de AŬGUSTO * **KURSOJ** trinivelaj
por internacia ĉeestantaro

8a —
21a de AŬGUSTO * **ARTMETIOJ**
kaj **ESPERANTO**

fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko,
kartonprilaboro — gvidataj en esperanto

22a de AŬGUSTO —
3a de SEPTEMBRO * **RENKONTO DE BLINDULOJ**

informoj, aliĝilo : esperantista kulturdomo kastelo Grésillon 49150 BAUGE, Francio

ESPERANTOFORLAGET A.S.

(ELDONEJO ESPERANTO A.S.)

Peer Gynt, Henrik Ibsen, majstre tradukita de E.A. Haugen. 285 paĝoj. Bindita. Versa dramo, la norvega nacia eposo. Prezo: 48 n.kr.

Victoria, Knut Hamsun, tradukita de Olav Rygg. 100 paĝoj. Konata kiel la plej bona amrakonto de la literaturo. Prezo: 10 n.kr.

Bagatelaro, Johan Hammond Rosbach. 176 paĝoj. Originala novelaro en simpla, ĉiutaga lingvo. Prezo: 16 n.kr.

Vibraj momentoj, Johan Hammond Rosbach. 83 paĝoj. 12 mallongaj rakontoj kun aldona studmaterialo, demandoj, klarigoj, taŭga por memstudado kaj por kursoj. Prezo: 36 n.kr.

La fingro de la diablo, Nils Christensen, trad. de la aŭtoro. 29 paĝoj. Novelo kun mezepoka temo. Prezo: 5 n.kr.

Esperanto – moderna lingvo, C. Støp-Bowitz, E. Vilborg, V. Setälä. 136 paĝoj. Studo pri la uzo de la pasivaj participoj. Prezo: 10 n.kr.

Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto, Olav Reiersøl. 91 paĝoj. Prezo: 25 n.kr.

ELDONEJO ESPERANTO peras multajn Esperanto-revuojn kaj havigas la plejmulton de la aĉetebla Esperanto-literaturo. — Al ĉiuj prezoj aldoniĝas la efektivaj afrankaj kostoj. — Niaj eldonaĵoj estas mendeblaj ĉe la Libro servo de UEA, ĉe via kutima libro servo, aŭ rekte ĉe:

Eldonejo Esperanto, Olaf Schous vei 18, OSLO 5, Norvegujo.

NOVA ANTOLOGIO

KROATIA POEZIO

kompletige al

**Moderna
kroatia
prozo**

302 paĝoj. 20 × 14 cm.
Bindita.


Prezo: 39 guldenoj (plus
sendokostoj 10 %).

**Por mendo ĝis la fino
de junio 50 % rabato!**

Mendu ĉe la eldonejo: Internacia Kultura Servo,
Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb.

Petu librokatalogon kun informoj pri niaj
eldonaĵoj kaj favoraj rabatoj.

ESPERANTO



IN THE MODERN WORLD
EN LA MODERNA MONDO

Studies and articles on language problems,
the Right to Communicate,
and the International Language.

Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj
la Rajto je Komunikado,
kaj la Internacia Lingvo.

1959-1982

esperanto press

Jen la longe bezonata impona Angla/Esperanta informlibro kun kontribuoj de multaj konataj aktivuloj, jam en dua reviziita pli ampleksa kaj firme bindita eldono, kun detalaj indeksoj. La libro celas

1. prezenti kiel lingvaj problemoj evoluis kaj kiun efikon ili havas en la moderna mondo;
2. ebligi al homoj, kiuj kapablas legi la Anglan, juĝi la ecojn de la Internacia Lingvo kaj legi Esperantajn tekstojn;
3. montri per dulingvaj artikoloj la literaturajn kvalitojn de nia lingvo kaj malkaŝi per represoj el libroj kaj periodaĵoj ĝian nunan praktikan uzadon en la plej diversaj kampoj;
4. pruvi, ke Esperanto povus solvi kaj internaciajn kaj naciajn lingvajn problemojn.

En la libro estas — ofte dulingve sur apudaj paĝoj — represitaj 8 Esperantaj kaj 15 Anglaj CED-dokumentoj. Sed ankaŭ multaj aliaj speciale por ĉi tiu libro verkitaj aŭ tradukitaj artikoloj enestas. Kaj duagrada lernantoj kaj lingvistikaj studentoj trovos en ĝi sciindaĵojn. La 600-paĝa verko, 21cm, 110 ilustraĵoj, troviĝu en ĉiu biblioteko, kiu posedas Anglajn konsult-librojn. Vendu ĝin al du bibliotekoj kaj ricevu la vian senkoste! Mendu ĉe Esperanto Press, Bailieboro, Ontario

Kanado, K0L 1B0 (afrankita prezo: Kan. \$ 32,00 aŭ US\$ 27,00) aŭ per pago al la poŝtĝirkonto 1173 68-306 en Hannover, Germanio de R. Eichholz, Bailieboro, Ontario (GM 64,00). Rabatoj: 3-9 ekz. 33%; 10-99 ekz. 40%; 100 kaj pli da ekz. 50%.